


El Popolo Cinese

人民中國報道

4 · 1963




HODIAŬA KAMPARO DE ĈINIO



Por livero de elektro al kamparo.
Foto de Tan Tieming

Veninte al Ŝuangĉeng-gubernio, Helong-
giang-provinco, la traktoroj "Orienta Ruĝo"
ricevis varman bonvenigon de la vastaj
komunumanoj. *Foto de Sju Vanju*



Printempo Venis al Ĉaŭbaj-rivero

ESTIS mateno. Mi iris laŭ la ŝoseo al la popola komunumo Fengbo kiu troviĝas en la baseno de Ĉaŭbaj-rivero.

Sur la ŝoseo de tempo al tempo preterpasis min aŭtoj, plenplene ŝarĝitaj per kemia sterko por la kamparo. Tre multaj estis ĉaroj tirataj de ĉevaloj aŭ bovoj, kiuj plejparte ankaŭ transportis sterkon. Mi akiris permeson de veturigisto veturi per lia bovĉaro destinita por la nomita komunumo.

En la kampoj multe da kamparanoj estis laborantaj: iuj riparigis irigaciajn kanaletojn kaj aliaj alportis sterkon. Plejparto de la unuaj estis junulinoj, preskaŭ ĉiuj havantaj sur la kapo diverskoloran kaptukon, kiu brilis en la sunradioj. De la lastaj la pliparto estis junuloj, iuj portantaj ŝultre kaj aliaj puŝante unuradan ĉareton. Inter la ĉarpuŝantoj oni vidis eĉ kelkajn virinojn. Multaj nigraj sterkamasoj estis dense dislokitaj sur la kampoj formante regulan desegnaĵon.

“Ĉu vi vidis?” la veturigisto demandis min, “Tiu ĉi jaron ni havas sufiĉe multe da sterko por printempa kulturo, kaj la puŝĉaretoj helpas nin tre multe. Tion ni lernis uzi dum la konstruado de la akvorezervejo de Mijun. Ni disvastigis ĝin nur en la lastaj unu-du jaroj, kaj dank’ al ĝia apliko oni kaj ŝparas homforton kaj pliigas laborefikon.”

En tiu tempo la bovĉaro ŝanĝis la direkton, kaj aperis antaŭ ni moderna pontego. Kun siaj helgriza korpo, agrabla al okuloj, glata supraĵo kaj belaj balustradoj riĉaj je dekoracia gusto, la ponto konvenus eĉ trovi lokon en urbo. Mi tute ne atendis ke tian imponan ponton oni trovos super Ĉaŭbaj-rivero.

“Kiel bela estas la ponto, kaj kiel nova!” mi krietis ne konscie.

“Oni finkonstruis ĝin nur antaŭ du-tri jaroj!”

“Kiel ĝi nomiĝas?”


“Iuj nomas ĝin Blanka Pontego, pli multaj nomas ĝin Eterna Ponto. . . .”

Kvankam la bovĉaro iris tre malrapide sur la ponto, sed, absorbite aŭskultante la veturigiston, mi trapasis la ponton kvazaŭ nur en palpebrumo. Returninte la kapon mi vidis ke la riverlito estas sufiĉe larĝa sed la fluo ne estas tiel granda, ĝi fluas silente kaj trankvile.

“Kvankam nun la rivero estas silenta kaj trankvila,” daŭrigis la veturigisto, “sed antaŭe, kiel multe da malfeliĉegoj ĝi alportis al ni! Ĉiam, kiam venis pluvsezono, oni maltrankviliĝis; se la pluvo daŭris tri tagojn, oni devis prepari sekajn manĝaĵojn por ien fuĝi. Estis terure, kiam inundakvo alfluis. Neniam mi vojaĝis malproksimen, kamarado, oni diras, ke la Flava Rivero estas tre larĝa sed la larĝo de Ĉaŭbaj-rivero atingas ie dudek liojn. Kvankam mi neniam vidis maron, mi ne scias kiel vasta estas la maro, sed ĉu la transa bordo de Ĉaŭbaj-rivero estas videbla? Ĉu ĝiaj ondegaj ne alten levas sin pli ol dek futojn? Kiam la akvego retiriĝis, oni trovis ke falis domoj kaj forlaviĝis ankaŭ kulturitaj kampoj ĉe la riverlito. En la jaro 1958, sole en nia komunumo forfalas pli ol dumil muoj da kulturitaj kampoj kune kun la plantaĵoj. Tial oni ĉiam diras ĉe ni: ‘dekjara rikoltado ne riĉigas, sed unujara nerikolto mizerigas!’ Oni semis ĉiujare en printempo sed neniu estis certa, ĉu oni povos trovi eĉ la ombron de la plantaĵo en somero, kiam venos superakvego. Ĉiun jaron post la Liberiĝo, kiam estis la pluvsezono, la partia sekretario kaj la estro de la gubernio devis veni kun multe da funkciuloj por kune kun la popolamaso kontraŭbatali la akvegon kaj gardi kontraŭ la riversveliĝo. La problemo estis ĝisfunde solvita nur en 1959, kiam la akvorezervejo de Mijun estis finkonstruita kaj la fluo subjugita. Tio ja estis la aspiro de la loĝantoj laŭ la bordoj de Ĉaŭbaj-rivero de multaj generacioj kaj ankaŭ granda faro de nia generacio por la bono de niaj idoj! Se ne, kial ni ĉiuj konkure sin anoncis por partopreni la konstruadon de la akvorezervejo tuj post la publikigo de la afero? Kamarado, rigardu laŭ tiu direkto, tie sub la deklivo estas vastaj kampoj ĉe la riverlito, kiujn oni komencis kulturi nur de la pasinta jaro.”

La Akvorezervejo de Mijun.

Foto de Li Hi



Rigardante laŭ la direkto de lia montrofringro mi vidis ke ankaŭ en tiuj kampoj estas dismetitaj sterkamasoj, kaj kelkaj bovoj plugas tie. Ŝajne, la komunumanoj havas grandan intereson por tiuj kampoj ĉe la riverlito; ili pli frue prilaboris ilin kaj la laboro estis plisubtile farita.

“Post nur iom pli ol duonmonato ni komencos la printempan semadon,” daŭrigis la veturigisto. “La prepara laboro por la semado de tiu ĉi jaro estas tre bona — sterko sufiĉa kaj kanaloj bone riparitaj, plie nia komunumo jam starigis du pumpstaciojn. Nun ni jam ne timas inundon. La fervoron de la komunumanoj vi povas klare rimarki sole el la nombro de la laborantoj en la kampoj. De kiam la akvorezervejo finkonstruiĝis, ni havis ĉiujare riĉan rikolton. Oni vidis, ke la forto de la kolektivo estas granda, kaj ekhavis fidon kaj laborfervoron Nu revenu ni al la pontego. Kompreneble ĝi estas konstruita post la akvorezervejo. En la pasinteco kiam la akvo leviĝis en la rivero, oni eĉ ne kuraĝis veturigi lignajn pramojn, pro tio ofte okazis ke la komunikado inter la vilaĝoj kaj la gubernia urbo ĉesis dum duonmonato aŭ pli. Eĉ kiam la fluo ne estas tiel ŝvelinta, nur unu aŭ du pramoj funkciis inter la bordoj. Tamen, la ĉaroj, ĉevaloj kaj piedirantoj atendantaj

por transiri la riveron svarmis ĉe ambaŭ bordoj kiel formikoj. Tre longan tempon oni devis atendi ĝis sia vico, tiel neeviteble iafaje okazis malagrablajoj, kaj tiam estis tre malfacile por la urbo nin provizi. Super la rivero oni antaŭe ankaŭ konstruadis lignan ponton, kiun oni ĉiujare devis ree malkonstrui. Ĉar oni povis uzi ĝin plejlonge nur dum vintro kaj printempo. Iun someron oni ne povis ĝin malkonstrui sufiĉe frue, la lignan pontegon kun pli ol tridek arkadoj tuj forportis la akvego! Se ne pro tio, kial la komunumanoj nomas la novan la Eterna Ponto? Tiun ĉi ponton la akvo jam ne povos forporti, nek detrui! Se ni ne havus tiun ponton, kamarado, ĉu la kemia sterko, sur kiu vi sidas, povus esti tiel facile transportata al la komunumo? Ĉu vi ne vidis la aŭtojn kurantajn sur la vojo? Ĉu la grenoj produktitaj de niaj komunumanoj povus esti tiel facile transportataj eksteren? Ĉu la traktoroj, kiuj nin helpas en printempa plugado, povus veni ĉi tien?”

La veturigisto, tiu hazarde renkontita vojkamarado, atentigis min, nove venanton, ke kun la veno de la printempo entuziasma tajdo de printempa plugado venos al Ĉaŭbaj-rivero kaj ke en la koro de la popolo ĉe ambaŭ bordoj de la rivero disfloras eterna printempo.

GAŬ GUANGGIAN:

La Ĉina Medikamenta Industrio

De Dependo de Importado ĝis Sufiĉa Memprovizado


La ĉina medikamenta industrio estis tre postrestinta antaŭ la Liberiĝo. La malmultaj medikamentaj fabrikoj en kelkaj marbordaj urboj ĉefe faris tabloj-

dojn, injektajojn, tinkturojn, kaj unguentojn el importitaj drogoj, aŭ repakis tiajn en malgrandajn pakajojn por uzado de konsumantoj kaj hospitaloj. Oni ne povis produkti eĉ la plej ofte uzatajn medikamentojn kiaj aspirino, sulfa-drogoj kaj penicilino. Pli ol okdek procentoj de la drogoj en la merkato estis importitaj. Laŭ la tiama statistiko de la doganejo, en 1946 dudek kvin landoj vendis al Ĉinio medikamentojn kun valoro de pli ol dek milionoj da usonaj dolaroj, kaj el tiuj medikamentoj pli ol okdek procentoj estis el Usono.

Por radikale ŝanĝi la postrestintecan de la ĉina medikamenta industrio kaj starigi sendependan medikamentan industrion, la Popola Registaro adoptis la politikon ĉefe disvolvi produktadon de bazaj drogoj kaj produkti farmaciajn preparaĵojn kompletige. Por



La kristaliga laborejo por penicilino de la Nordĉinia Medikamenta Fabriko.

Foto de Vu Jinbo



efektivigi tiun ĉi politikon, krom reordigo, reformado kaj rekonstruado de parto de la ekzistantaj farmaciaj kaj prilaboraj fabrikoj, oni koncentrigis la ĉefajn fortojn al eksperimento kaj produktado de bazaj drogoj, kaj sur la bazo de tio, kelkaj modernaj fabrikoj kiuj produktas sole bazajn drogojn, estas paŝo post paŝo establitaj. En 1952, la unua penicilina fabriko komencis produktadon. Dum la periodo de 1953 ĝis 1957, kelkaj fabrikoj produktantaj penicilinon, sintomicinon, kaj sulfa-drogojn kaj fenacitinon, estis establitaj kaj komencis produktadon unu post alia. De 1958 ĝis 1962, ne nur la ekzistantaj fabrikoj estis plivastigitaj kaj la produktopovo plialtigita, sed ankaŭ novaj fabrikoj kaj laborejoj establiĝis por produkti aliajn gravajn drogojn. La kreskado de produkto de bazaj drogoj akcelas la disvolviĝon de farmaciaj preparajoj. Nun el la ĉinaj memproduktitaj bazaj drogoj ĉirkaŭ mil specoj de farmaciaj preparajoj povas esti farataj. Ekzemple, en 1960 du mil sepcent milionoj da ampuloj de injektaĵoj, kaj sesdek kvar mil milionoj da tablojdoj estis produktitaj. Pro la grandakvanta produktado de bazaj drogoj kaj farmaciaj preparajoj, la medikamentoj enlande produktitaj fundamente sufiĉas ne nur por la bezono de la ĉina popolo mem, sed ankaŭ estas eksportataj je ĉirkaŭ cent specoj de bazaj drogoj kaj farmaciaj preparajoj.

Angulo de la Tiangin-a Fabriko por Agrokulturaj Medikamentoj.
Foto de Song Hjueguang



Kuracisto ekzamenas cerban malsanon de paciento helpe de encefalografia aparato.

Foto de Sun Ifu

Plimultigo de Specoj kaj Subteno al Agrikulturo

Por kontentigi la bezonojn de la vasta popolamaso, oni donis specialan atenton al esplorado kaj produktado de novaj specoj de bazaj drogoj. Rimarkindaj atingoj estis akiritaj dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano (1958 — 1962). Prenu la produktadon de antibiotikoj kiel ekzemplon, en la periodo de la Unua Kvinjara Plano (1953 — 1957), nur penicilino, oromicino, kaj sintomicino estis produktataj, sed dum tiu de la Dua Kvinjara Plano, ankaŭ aliaj ofte uzataj antibiotikoj, kiel streptomicino, kloromicetino, tetraciklino, teramicino, eritromicino, neomicino ktp. estis produktataj en granda kvanto. La totala produkta kvanto de antibiotikoj en 1961 estis pli granda ol tiu dum la tuta periodo de la Unua Kvinjara Plano.

Por subteni la agrikulturon, la ĉina medikamenta industrio, kunlaborante kun koncernaj fakoj, krom garantii la produktadon kaj provizadon de malgrandaj farmaciaj preparajoj bezonataj de la vilaĝoj (kiaj sulfa-drogoj, kontraŭ febraj analgeziaj drogoj ktp.), ĉiam kun alta atento zorgas pri la produktado de drogoj por kuraci parazitajn malsanojn kaj endemiojn, kiuj vaste disvastiĝis en Ĉinio en la pasinteco. Dank' al la produkto de tiuj ĉi drogoj, multaj parazitomalsanoj kaj endemioj efike kuraciĝis. La epidemio de nigra-febra malsano, kiu cirkulis en Ŝan-

dong-provinco por cent jaroj, estas elradikita dank' al kuracado per efika medikamento. Krome, la medikamenta industrio de nia lando ankaŭ provizas la vilaĝojn per antibiotikoj kaj sulfa-drogoj por kuraci malsanojn de dombestoj kaj kortbirdoj.

Kresko de Teknikaj Fortoj

La teknikaj fortoj de la ĉina medikamenta industrio jam multe kreskis. Dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano, esploraj kaj projektaj institutoj de medikamenta industrio establiĝis ankaŭ en Tiangin, Vu-Han kaj Kantono, krom tiuj rekte sub la direktado de la centra registaro. Samtempe, specialaj fabrikoj de farmaciaj ekipaĵoj estis establitaj, kaj personoj por instalado de farmaciaj ekipaĵoj elkulturitaj. La fortoj por esplorado, projektado, fabrikado kaj instalado povas pli malpli kontentigi la bezonojn de la disvolviĝanta nacia medikamenta industrio.

Ankaŭ la teknika nivelo de la medikamenta industrio altiĝis. Ĝenerale, ĉirkaŭ okdek procentoj de la tablojdoj nun produktataj estas laŭnormaj en kvalito, dum en la unuaj jaroj post la Liberiĝo, estis nur kvindek procentoj. La plejparto de la bazaj drogoj konformas al la normoj fiksataj en la farmakopeo. La eksportataj produktaĵoj konformas al la eksportaj normoj. Krome, la leviĝo de la teknika ni-

velo sin montras ankaŭ en tio, ke pli da drogo estas produktata el la sama materialo kaj per la samaj ekipaĵoj kaj hompovo. Ekzemple, dank' al la teknika studado farita dum la pasintaj jaroj, la kvanto de penicilino nun produktata per ferment-cisterno de la sama volumeno estas unu kaj duonan oblojn pli granda ol tiu en 1952.

La altigo de la teknika nivelo ebligis la ĉinan medikamentan industrion ne nur produkti pli multajn kaj pli bonajn drogojn, sed samtempe ankaŭ senĉese malaltigi la prezon, por plifaciligi la vivon de la popolo. La prezo de penicilino malaltiĝis je pli ol duono kompare kun tiu en 1958. En la lastaj tri jaroj, la prezo de streptomicino jam malaltiĝis trifoje. Nun la prezo de streptomicino egalas nur dekonon de tiu de la importita antaŭ la Liberiĝo.

La sukceso atingita de la ĉina medikamenta industrio estas granda. Tamen, ĉar en Ĉinio loĝas la plej multnombra popolo, la medikamentoj bezonataj estas grandakvantaj kaj multspecaj. Por kontentigi la bezonojn de la vasta popolamaso kaj dombestoj kaj kortbirdoj, la ĉina medikamenta industrio, krom senĉese pliigi la produktadon, ankaŭ daŭre klopodas en eksperimentado kaj esplorado de novaj produktaĵoj, en levado de la kvalito de produktaĵoj kaj de la nivelo de produkta tekniko.

BIAN-GI:

Metia Urbo en Tibeto



ŜJEKAZ estas la dua granda urbo en Tibeto kaj grava centro de metia produktado en centra Tibeto. Nun en la bazaro ĉi tie sin trovas en grandaj kvantoj lokaj manfaritaj produktaĵoj, riĉaj je naciaj trajtoj. Inter ili estas delikataj, glate poluritaj lignaj bovloj en diversaj dimensioj, diversaj brile kolorigitaj naciaj kostumoj, artisme faritaj tibetaj botoj, seloj, bloviloj el ledo kaj ĉiuj aliaj necesaj bezonataj de la kamparanoj.

Tibet-kusenoj kaj pulu-o (*Tibeta ŝtofo el lano*) estas aliaj famaj produktaĵoj de la loko, sed la plej popularaj vendadoj restas ĉiutagaj necesaj kaj feraj iloj uzataj en agrikulturo kaj paŝtado. La aĉetantoj estas plejparte kamparanoj kaj paŝtistoj ĵus liberigitaj el servuteco.

Laŭ ĝenerala koncepto, metiistoj estas sendependaj, liberaj produktantoj. Sed en Tibeto, ili havas sian historion de sango kaj larmoj. Antaŭe, en la

Lasta procedo en farado de tibeta tapiŝo.

Foto de He Ŝijaŭ

feŭda servuta socio, neniu el la metiistoj havis personan liberecon. Ili estis servutuloj aŭ sklavoj de la bienulo-mastroj. Ili devis produkti por la mastroj senpage. Iam eĉ okazis ke iuj servutuloj devis labori por ili dum dekoj da jaroj en mallibereco. Nur en 1961, kiam la Demokratia Reformo estis efektivigita en Tibeto kaj la feŭda servutismo estis renversita, la metioj en Ŝjekaz akiris novan disvolviĝon. Por tion akceli la Popola Registaro donis ekde 1959 al la metiistoj pruntmonon je malaltaj interezoj kaj liveris al ili la necesajn materialojn. Laŭ nekompleta statistiko, en la jaro 1961 sola, la materialoj liveritaj al la urbo Ŝjekaz jam valoris ĉirkaŭ 130,000 juanojn.

Post tio, la totala valoro de la produktajoj kreskadas ĉiujare. Tial, ankaŭ la metiistoj multobliĝis. Ekz., antaŭ la Demokratia Reformo, en la tuta urbo estis nur 43 forĝistoj, kaj nun la nombro estas pli ol cent. La tuta urbo havas pli ol mil familiojn, kiuj formas trionon de la loĝantaro, sin okupas en metia produktado. Kaj estas organizitaj ankaŭ interhelpaj produktaj grupoj kaj produktaj kooperativoj. Multiĝas ankaŭ la specoj de metioj. Je la komenco de la Demokratia Reformo estis nur 13 metioj en la urbo, sed nun estas ĉirkaŭ dudek kvin.

Antaŭ la Demokratia Reformo la tibetaj metioj suferis de mallumo dum longa periodo. Multaj branĉoj agoniis. Iuj metioj, tre necesaj por la produktado aŭ la vivo de la popolamaso kiel forĝado, fabrikado de pulu-o, vestfarado, botfarado ktp., forvelkis pro kruela ekspluatado de la servut-mastroj kaj la mizereco de la laboranta popolo. La metiistoj, kiuj

estis konsiderataj kiel la plej malaltrangaj elementoj de la socio en la malnova tempo estis devigataj produkti nur luksaĵojn por la servut-mastroj, sed nun ili fariĝis la plej estimataj homoj, kiuj servas agrikulturon kaj paŝtadon.



Farado de agrikulturiloj.



Fotoj de He Ŝijaŭ.

Teksado de pulu-o.

Laboristo-matematikisto



Ju Ĝenŝan kaj lia nova kalkulilo. Foto de Ĝang Hiu

EN la n-ro 5, 1962 de "El Popola Ĉinio" la artikolo "Matematiko Inspirita de Tableto", iom klarigis la novan kalkulmetodon kreitan de la laboristo-matematikisto Ju Ĝenŝan, kaj tio interesis multajn legantojn. S-ano V. V. Kulikov de Sovetunio volas informi pli detale pri la inventado de Ju Ĝenŝan, la saman postulon prezentis ankaŭ S-ano P. Arnandov de Bulgario; kaj S-ano B. Vogelmann de Okcidenta Germanio deziras interŝanĝi germanajn kalkulilojn kontraŭ tiu kreita de Ju Ĝenŝan. Oni volas scii: Kiel tiu vilaĝa lignajisto fariĝis matematikisto? Kiel li surpaŝis la vojon de sia kreado? Kian novan objekton li studas nun, kaj kiajn sukcesajn spertojn li havas en sia laboro?

EN LIA STUDĈAMBRO

Kun la supre menciitaj demandoj mi intervjuis Ju Ĝenŝan. Li akceptis min en sia studĉambro. Ĉi tiu studĉambro estas iom neordinara: krom lignaj modeloj kaj abakoj grandaj kaj malgrandaj, sur la muroj, tabloj kaj planko troviĝis multaj lignaj pecoj longaj, mallongaj, triangulaj kaj rondaj, kaj ankaŭ hakilo, martelo, segilo ktp.; ĝi ja similas al la laborejo de lignajisto. Li rimarkis mian scivolemon kaj ridante klarigis: "La modelojn uzatajn en mia studado mi mem faras laŭeble. Tio ne nur celas ŝpari monon por la ŝtato, sed ankaŭ ĉar mi estis lignajisto jam dum mia duonvivo kaj havas malnovan kutimon mem fari ĉion."

Li estas nun instruisto de la matematika fakultato de la Hebej-a Universitato en Tiangin. Oni estime nomas lin "matematikisto" aŭ "inventisto". Tamen li ankoraŭ sintenas modeste kiel antaŭe kiam li faris la lignaĵojn.

MALFACILA TASKO

En 1923, en iu modesta vilaĝa elementa lernejo, grupo da infanoj aŭskultis kun atento lecionon. La instruisto vokis la lernantojn unu post alia ke ili recitu la tabelon de multipliko. Tiuj, kiuj ne povis reciti, ricevis punon — batadon al la manplato.

"Sinjoro instruisto, ĉu estas nepre necese reciti la tabelon de multipliko en la lernado de aritmetiko?" denove demandis iu knabo aparte scivolema, kaj tiu estis Ju Ĝenŝan.

"Aŭ sur papero, aŭ sur abako kalkulante oni ĉiam devas reciti la tabelon de multipliko. Krom tio, vi devos parkeri ankaŭ multajn formulojn kaj teoremojn en la mezlernejo."

"Kion fari!" pensis Ju Ĝenŝan. Kvankam li neniam ricevos punon pro malsukceso en recito de la multiplika tabelo, tamen por la malsaĝaj kunlernantoj estas alia afero. "Ili ricevas batojn nun, kaj ili ankoraŭ devos ricevi batojn en mezlernejo! Kiel bone estus, se mi elpensus novan metodon, dank' al kiu oni ne plu bezonus parkeri la tabelon de multipliko, nek memori la formulojn!" Tio estis la malfacila tasko, kiun li starigis por si.

DU FOJOJ DA "GRAVAJ VUNDIĜOJ"

La unuafojo okazis kiam li forlasis malvole la lernejon. Li vizitis la elementan lernejon nur tri jarojn, kaj ne povis tion daŭrigi pro malriĉeco de la familio. Li povis nur helpi sian familion en terkulturado. Vidante siajn ludkamaradetojn suferi en laborado por bienuloj, li deziris krei terkulturan maŝinon por malpliigi la suferon de la kamparanoj. Oni diris, ke en la Nordoriento troviĝas tia maŝino, tial, li piediris pli ol 3,000 kilometrojn for de sia hejmvilaĝo en Hebej-provinco, kaj alvenis al Hejho. Laborante kiel kulio li iom post iom laŭdesegnigis la partojn de traktoro. Tamen neatendite, tio estis rimarkita de la kruela laboristĉefo kaj li preskaŭ perdis pro tio sian vivon.

La duan kaŭzis la *Romano pri Tri Regnoj*, romano tre populara en Ĉinio. En tiu libro li legis: En la tria jarcento, la ĉefministro de Ŝu-regno kreis lignajn bovojn kaj ĉevalojn, per kiuj oni transportis nutraĵojn por la armeo tra krutegaj montvojoj. En



Ju Ĝenŝan klarigas sian "kubeto-linian radikigan kalkulmetodon" al lerneĵanoj de la Dependenda Gimnazio de la Hebej-a Universitato.

Foto de Ĝang Hiu

NOVA STUDENTO, NOVA PROBLEMO

Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la kreado de Ju Ĝenŝan eniris tute novan etapon. La popola registaro sendis lin studi en Bejjang-universitato kaj Nankaj-universitato en Tiangin, kaj ĉiumonate salajris lin kiel antaŭe, por ke li lernu sen zorgoj pri la vivo de sia familio. La universitatoj speciale elektis instruistojn por helpi lin solvi malfacilaĵojn, kiujn li renkontis pro sia malalta klereco. Post ses jaroj, li diplomiĝis kiel eminenta studento.

De tempo al tempo la ŝtato sendis lin al vilaĝoj kaj fabrikoj, por ke li komprenu la postulojn pri matematiko kaj kalkulado elmetitajn de la laboristoj kaj kamparanoj el la praktiko de produktado. Li

trovis, ke post la agrokultura kolektivigo, pli kaj pli grandiĝas la amplekso de agrokulturaj produktaĵaj kooperativoj, pli kaj pli grandiĝas ankaŭ la ciferoj en produkta administrado kaj financaj spezoj, kaj pli kaj pli precizaj kalkuloj estas postulataj. La malnova metodo de liniila kalkulado jam ne plu povas kontentigi tian novan bezonon, ĉar ĝi ne povas solvi la kalkulon de grandaj nombroj. Li decidis entrepreni novan studadon.

ĈIAM ANTAŬEN SUR LA VOJO DE KREADO

La afero ne iris ĉiam glate, kvankam li jam akiris sisteman teorion de matematiko kaj trovis la ĝustan direkton por sia laboro. Li iam intencis fari lignan kalkulaparaton, laŭ moderna kalkulaparato por ke ĝi povu esti vaste uzata en la vilaĝoj. Sed post penado dum kelkaj jaroj, li atingis neniun sukceson. Ĉar la dentradoj faritaj el ligno ne estis sufiĉe precizaj, kaj sekve oni ne povis ricevi tute korektajn rezultojn dum kalkulado.

Iuvespere, liaj kolegoj iris rigardi filmon, kaj en la ĉambro restis nur li sola. Li prenis pecojn da ligno por fari malgrandan kvadratan tablon. Sur ligna tabulo li faris kvar truojn, kaj almetis kvar piedojn. Jen sur la supraĵo de la duonpreta tableto sin montris kvar stumpoj. Li ne tuj ilin forrobotis, sed atente observadis, kaj cerbumadis dum kelkaj horoj. Neatendite, li malkovris ion el tiu tableto, el kio ĝermiĝis lia nova kreaĵo "kubeta kalkulmetodo". Poste, el la "kubeta kalkulmetodo" evoluis lia "stangeto-globa kalkulmetodo". (Vidu la detalon en n-ro 5/1962 de *El Popola Ĉinio*)

Ju Ĝenŝan ne ĉesigis sian studadon. Li trovis ke la "stangeto-globa kalkulmetodo" estas maloportuna

la romano oni detale priskribis ilian faradon kaj la mezurojn de iliaj partoj. Reveninte de la Nordoriento Ju Ĝenŝan baldaŭ estis absorbita de tio. Por fari tiajn lignajn bovojn kaj ĉevalojn, li komencis lerni la metion de lignajisto. Post kvin jaroj, li ellernis la metion, sed pruvis el la studo la t. n. lignaj bovoj kaj ĉevaloj estas nur mitaĵoj.

Parolante pri tiuj fiaskoj, Ju Ĝenŝan diris ĝemante: "Ĉi tiuj du fojoj da 'gravaj vundiĝoj' donis al mi lecionon tre profundan. La ceteraj malsukcesoj malpli grandaj ja estas ne kalkuleblaj." Per unu frazo li resumis sian vivohistorion de 26 jaroj en la malnova socio: "Tiam mi nur blinde klopodadis, sed nenie mia energio havis la eblecon esti korekte utiligita."

SUKCESON LI ATINGIS

En 1942, la hejmvilaĝo de Ju Ĝenŝan estis liberigita. Li partoprenis la revolucionan laboron kaj ekbrilis en lia koro la vero de revolucio kaj ĝustan direkton li trovis por sia studado. Li kaj laboris kaj memlernis diligente, kaj iom post iom li atingis la klerecon de gimnaziano. En 1947, li sukcesis fari sian unuan kreaĵon "liniila kalkulado"! Laŭ tiu kalkulmetodo oni povas per ordinaraĵaj gradigitaj liniiloj solvi aritmetikajn problemojn de adicio, subtraho, multipliko, divido, potencigo, elradikado, proporcio ktp. Jen realiĝis lia idealo liberigi la lernantojn de parkerado de la multiplika tabelo. Poste, la kalkulaj liniiloj disvolviĝis en rondan kalkulilon konforman al la principo de natura logaritmo. Tiu ĉi kreaĵo tuj estis laŭdata kaj disvastigata de la popola registaro de la liberigita regiono.


pro metodo de stangetoj kaj kalkulado de globetoj, kaj li klopodis ĝin plibonigi. Antaŭ nelonge, surbaze de la "stangeto-globa kalkulumetodo" li kreis la "kombinan kalkulumetodon" kaj "rapidan kaj ekzaktan abakokalkulumetodon", plisimpligis tiel la kalkuladon por pli bone plenumi la bezonon de la librotelistoj kaj statistikistoj de la vilaĝaj popolaj komunumoj.

LIA SPERTO DE KREADO

Ju Ĝenŝan diris: "Ĝenerale oni opinias ke matematiko estas ege abstrakta scienco. Sed laŭ mi, ĝi estas ankaŭ tre konkreta kaj praktika. Same kiel ĉiuj naturaj sciencoj, matematiko estas nenio alia ol la spegulado de la objektiva realo, ĝi estas intime ligata kun la produktado kaj vivo."

Rememorante sian kreadon de la "kubeta kalkulumetodo", li daŭrigis: "En tiuj tagoj, mi estis tute absorbita de mia eksperimento. Vidante ĉion ajn, mi emis pripensi atente. Oni scias nur, ke mi trovis novan kalkulumetodon tra observo de tableto, sed fakte, mi observis ne nur la tableton. Hejme, mi iam studis la lignan kradon de fenestro kaj la rilatojn inter la vertikalaj kaj la horizontalaj stangoj de la krado; kaj ekstere, mi studis ankaŭ la rilatojn inter la reloj kaj ŝpaloj de fervojo. Ĉio tio min klerigis. Same kiel la kvar piedoj de la tableto, ankaŭ ili klerigas la saman principon."

Ju Ĝenŝan ĉiam firme kaptas tion, kion oni kutime vidas kaj kontaktas en la ĉiutaga vivo, atente ĝin



"Kalkulumetodo de Ju Ĝenŝan"

observadas kaj profunde esploradas, por trovi kaj pruvi kaj apliki matematikajn principojn en la reala vivo. Li diris: "Trove novan kalkulumetodon el studo de tableto ŝajnas hazardo; sed fakte la ĵus menciita principo ĉiam gvidas mian studadon."

Finante la artikolon mi devas sciigi al niaj legantoj ke intervjuite de mi, tiu ĉi laborista matematikisto jam interesiĝas pri Esperanto, kaj intencas ĝin eklerni. Eble en la estonteco ni povus vidi kontribuon de ĉi tiu sciencisto en la esperantaj sciencaj aktivadoj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Nova Serio de Ĝimnastikaj Ekzercoj

En aprilo publikiĝis en Pekino nova serio de ĝimnastikaj ekzercoj por la ĝenerala publiko. Ĉiuj ĵurnaloj publikigis ĝian diagramon. Ankaŭ la Pekina Televida Stacio aranĝis specialan programon por diskonigo de tiu ĉi serio.

La tuta serio daŭras kvar minutojn. Ĝi estas preparita por sidantaj laborantoj. Ekde 1951, post publikiĝo de la unua serio de ĝimnastikaj ekzercoj por plenaĝuloj, tia ne tre forta fizika ekzercaro ricevas vastan aprobon ĉe la ĝenerala publiko. Ĉiuj radiostacioj en Ĉinio disaŭdigas muzikan akompanon de la ekzercaro po kelkaj fojoj ĉiutage, kaj ĉiuj oficejoj kaj fabrikoj permesas du fojojn de ripozo de dek ĝis dek

kvin minutoj en la labortempo ĉiutage por ebligi tian ekzercadon.

"Printempo de Ŝanhajo"

"Printempo de Ŝanhajo", la muzika festivalo en Ŝanhajo ĉijare okazis kvarfoje.

Ĝi daŭris naŭ tagojn (11—20, majo) kaj estas prezentitaj en kvin teatrejoj dudek unu muzikaj prezentadoj. Partoprenis en la festivalo pli ol 3,600 muzikistoj kaj muzikaj amatoroj. Kaj la nombro de la aŭskultantaro atingis 47,000 person-fojojn.

La ĉijara "Printempo de Ŝanhajo" karakteriziĝas per tio, ke el la prezentitaj kantoj, la plej okulfrapaj estas la revoluciaj popolamasaj kantoj kaj muzikaj verkoj, inkluzive la kontraŭ-

imperiismajn verkojn de aliaj aziaj landoj kaj landoj de Afriko kaj Latin-Ameriko.

Nova iniciato estas konkursoj de Erhu-ludado kaj violon-ludado. La unua muzikilo estas dukorda kaj tre populara en Ĉinio.

Novaj Loĝejoj en Pekino

Loĝejoj kun 5,380,000 kvadratmetroj da plankspaco estas konstruitaj en Pekino en la periodo de la periodo de la Dua Kvinjara Plano (1958-1962). Plejparto de la novaj loĝejoj estas kvar- aŭ kvin-etaĝaj, kun modernaj komfortaĵoj. Kaj ĉirkaŭ la loĝejoj estas lokoj por arboj kaj floroj.

La nove konstruitaj loĝejoj en Pekino, depost 1949 superas, laŭ plankspaco, tiujn antaŭ la Li-berigiĝo.

Dekmil Marmejloj da Vojaĝo

— Vizito al la varŝipo “Paco” reveninta de Okcidenta Afriko —

LA 21-an de marto, vaporŝipeto nin veturigis malrapide al la varŝipo “Paco”, antaŭ nelonge reveninta de la malproksima Okcidenta Afriko kaj nun ankranca en Huangpu-haveno ĉe la buŝo de la Perla Rivero. “Paco” portis ĉinajn specialistojn kaj materialojn al Gvineo por helpi la konstruadon de ĝia popolo, kaj triumfe ĝi revenis plena je amikeco de la popolo de Gvineo.

Ni vizitis la varŝipon. Ĝiaj helverda korpo kaj lakteblanka balustrado impresis la vizitantojn per freŝeco kaj trankvileco. La asistanto de ŝipestro diris al ni: “La plejparto el la ŝipanoj estas eledukita nur post la Liberiĝo. Kaj la ŝipo — konstruita de nia lando mem en 1958, kaj la maŝinoj, mebloj, dekoracio, ĉiuj tiuj ekipaĵoj de la ŝipo estas produktitaj de nia lando. . .”. Ni ĉirkaŭrigardis ĝian salonon. La ŝranko kun gravurita flordeseĝo laŭ antikva stilo, la lakajoj de Fuĝoŭ kaj la porcelanoj de Gingdeĝen, la ĉinstilaj pentraĵoj de Ki Bajŝi sur la vandoj . . . ĉio ĉi estas riĉa je nacia gusto. Jen varŝipo vere ĉinstila! La asistanto daŭre informis al ni: “Paco” estas la unua varŝipo de nia lando, kiu veturis al Okcidenta Afriko. Ĝi trapasis tiom longan vojon por la unua fojo; ankaŭ la ŝipanoj edukitaj de nova Ĉinio la unuan fojon trapasis la provon de tiom longe kontinua surmara vivo.

TRANS DU OCEANOJ KAJ TRI MAROJ

La varŝipo ekveturis el Huangpu-haveno en lasta novembro. De la suda parto de Ĉinio ĝis Okcidenta Afriko oni devas veturi preter pli ol dek landoj, tra la Suda Ĉinia Maro, la Hindia Oceano, la Ruĝa Maro, Mediteraneo kaj Atlantiko. La tuta vojo



longas pli ol dek mil marmejlojn kaj egalas al duono de la ekvatoro. Dum tiu ĉi navigado ili travivis kelkajn sezonojn. Kiam la ŝipo ekveturis de Huangpu-haveno, la ŝipanoj portis substofitajn vestojn; sed en la Ruĝa Maro, oni ŝvitis portante eĉ nur subĉemizon; kelkajn tagojn poste, kiam la varŝipo eniris Mediteraneon, la vetero subite ŝanĝiĝis de varmega somero en frostan vintron, kaj la ŝipanoj devis surmeti sur sin vatitan veston kaj kiam la varŝipo atingis Gvineon kie prospere kreskas palmoj, bananoj kaj mangoj, ili denove vivis en vetero tiel varma ke oni bezonis nur veston sensubŝtofana.

URAGANO SUR LA MEDITERANEO



En la mezo de lasta decembro, kiam la varŝipo veturis sur Mediteraneo, okazis uragano. La inke nigra maro ekondegis furioze kun blanka ŝaŭmo kvazaŭ boligita akvo. Pli kaj pli fortiĝis la ŝtormo kaj altiĝis la ondoj. La varŝipo “Paco” estis ĵetita supren kaj malsupren kiel malgranda olivo. Tiam la ŝipestro kaj lia asistanto persiste postenis ŝultron ĉe ŝultro en la direktilejo aplombe gvidante la veturon; la ĉefingenero dum dekoj da horoj restis en la varmega maŝinejo por sekurigi la ĉefan motoron kaj la kelneroj persiste daŭrigis sian servon en la manĝejo kun malordigitaj mebloj. Subite aŭdiĝis, tra la hurlo de la uragano, stranga pum-pum-ado — la kablo fiksliganta la supron de la peza levstango kun la ĉefmasto ĉe la pruo estis iom malligita de la ventego kaj eksanceliĝis la granda, pli ol dek metrojn longa levstango. Ĉiu estis ege maltrankvila ekvidinte tion. Se la levstango rompiĝus, ĝi difektus ekipaĵojn sur la ferdeko kaj la direktilejon. En tiu kriza momento, la ĉefmaristo Li Gianmaŭ kaptis kablaron, rampis laŭ ĝi trans la ferdekon atakatan de ondegaj, kuraĝe surgrimpis la ŝanceliĝantan maston kaj firme ligis la pezan levstangon. La uragano daŭris dum du tagnoktoj, sed la maristoj kuraĝe venkis ĝin sur la nekonata marvojo kaj daŭrigis sian navigadon.

ĈINIO, BONA AMIKO!

En la novjara tago de la kuranta jaro la varŝipo “Paco” atingis Konakri, la ĉefurbon de Gvineo. Tio fariĝis grava novaĵo de la tago en la ĉefurbo kaj altiris al si multe da afrikaj amikoj. Dum pluraj tagoj vizitadis la ŝipon multaj gastoj, el kiuj troviĝis altrangaj oficistoj de Gvineo kaj la ambasadoroj kun sia edzino de Vietnamio, Kubo k.a. Multe da gvineaĵ

amikoj skribis varmajn vortojn en la memorlibron de la ŝipo. Kiam "Paco" atingis Konakri, ĉe la kajo jam svarmis ŝipoj. Sed informiĝinte ke venas ŝipo el Ĉinio, la direktanto de la haveno tuj faris aranĝon por ke la ĉina ŝipo havu lokon por ankri. Dum la malŝarĝo de la varoj, ankaŭ laboristoj de Gvineo donis grandan subtenon. En dimanĉo, sur la ŝipo ankoraŭ aŭdiĝis la zumado de vinĉo. La gvineaj laboristoj volonte, daŭre malŝarĝis la varojn de la ĉina ŝipo dum la ripoztago. Ĉar la disponigitaj dek ŝarĝaŭtoj ne sufiĉis por rapida malŝarĝo de la cemento, la koncerna instanco tuj venigis pluajn dek aŭtojn. Kaj sur la kajo, kaj sur la stratoj, ĉinaj maristoj ofte renkontis ridetantajn vizaĝojn kiuj ilin salutis. Kiam la urbanoj de Konakri pasante preter la marbordo renkontis ĉinajn maristojn survoje, ili

varme kaj laŭte salutis ilin levante sian manon; "Ĉinio, bona amiko!" Kvankam estis neeble kompreni unu la alies lingvon, sed en iliaj okuloj senescepte brilis la profunda amikeco de la gvinea popolo al la ĉina popolo.



TEO

ĈINIO estas unu el la landoj, kiuj komencis produkti teon plej frue. Ekde la dinastioj Kin kaj Han (221 a. K.—220 p. K.), teo jam fariĝis trinkaĵo de ĉinoj. En Tang-dinastio (618—907 p. K.), la produktado de teo disvastiĝis en la basenoj de la riveroj Jangze, Ĝu kaj Min, kaj tetrinkantoj troviĝis tra la tuta lando. Kaj Lu Ju, ermito de Tang-dinastio, verkis libron *Pri Teo*, la unuan en la mondo koncerne la temon.

En la 16-a kaj 17-a jarcentoj, Ĉinio starigis komercajn rilatojn

kun Portugalio, Nederlando, Anglio kaj aliaj landoj, kaj grandkvante eksportis teon. Ĉar verda teo enhavas riĉan vitaminon C tiam bezonatan de la maristoj, al kiuj mankis freŝaj legomoj dum la vojaĝo sur maro, tial ankaŭ la kunportado kaj disvastigado fare de la maristoj estas la kaŭzo de popularigo de teo. Dum cent jaroj la ĉina teo havis monopolon super la monda merkato de teo, kaj hodiaŭ ĝi ankoraŭ restas fame konata de la tuta mondo. La Perla Teo sola produktata en Ŝaŭhing-gubernio de Ĝegiang-provinco estas vaste vendata en pli ol kvardek landoj de Azio, Afriko, Eŭropo kaj Ameriko.

Dum la longa praktikado ĉinaj teokulturistoj sukcesis kulturi multajn bonegajn specojn de teo, ekz. "Longging", "Puer", "Kihong (Nigra Teo de Kimen)", "Tun-lu (Verda Teo de Tunhi)", "Tieguanjin", ktp. estas vaste konataj.

Ĉiam pli vastiĝadas la regiono de teokulturado. Nun te-arboj estas kulturataj en 15 provincoj kaj regionoj de Ĉinio inkluzive

Tajvan, norde ĝis Kin-montaro kaj Huaj-rivero, okcidente ĝis Siĉuan kaj Junnan, kaj en la sudo kaj oriento ĝis la marbordo. En la lastaj jaroj te-arbojn oni sukcesis planti ankaŭ en Tibeto de Ĉinio, ĉe la okcidenta flanko de Erlang-monto, 2000 ĝis 3000 metrojn super la marnivelo.

Ankaŭ la arto de teopreparado de Ĉinio estas delonge fame konata tra la mondo. Estas tri specoj de teo produktataj en Ĉinio laŭ la metodo de la preparado, nome, nefermentinta, duonfermentinta kaj fermentinta. La nefermentinta teo estas la verda teo kaj inter kies plej famaj specoj estas "Longging". "Vulong-teo" kaj "Gin-teo" estas duonfermentintaj. La plej famaj el la unua speco estas "Tieguanjin", "Sujhian" k. a., kaj la "Gin-teo" inkluzivas "Puer" k. a. Fermentinta teo estas konata kiel nigra teo, kaj la plej bonkvalita estas tiu produktata en Kimen.

En la produktaj regionoj de teo kuras la proverbo: "Dum unu nokto maljuniĝis teo." Ĉiujare en marto kaj aprilo estas la plej streĉa sezono en Ĉinio por kolekti la printempan teon. Tiam teorikoltantaj knabinoj kun bambua korbo sur la dorso estas tre okupataj pri la kolektado inter te-arboj. Ĉijare en multaj regionoj de Ĉinio oni havas denove abundan rikolton de la printempa teo.

La Minista Lampo

— El la Taglibro de Juna Ministino —

La 19-an de okt., 1959

Plena semajno jam forpasis depost kiam mi venis al la sekcio de ministaj lampoj, sed ankoraŭ neniu regula laboro estas asignita al mi. La maljuna sekciestro diris: "Estos al vi permesite eklabori almenaŭ post du monatoj." Mi volis prezenti al li mian kritikon ke li estas tro konservativa, sed estante bubino ĵus diplomita el malsupera mezlernejo, mi ja ne kuraĝis tion fari.

La 23-an de okt., 1959

Kiel interese estas sube en la ŝakto! Sed eĉ unu fojon mi ne iris tien. Ni lasu ĉion alian kaj prenu nur la rajdon en la kaĝo. Kia ĝuo! Same kiel la rajdo en lifto!

Mi estis frotpuriganta lampojn, kiam la maljuna sekciestro venis al mi por aparta interparolo. Kial aparta interparolo? Hm, faru laŭ via plaĉo.

"Ŝajnas al vi kurioze kaj interese esti sube en la ŝakto, ĉu ne?" demandis al mi la maljuna sekciestro.

"Ne, mi volas servi en la produktado!"

"Ĉu la laboro de la lampejo ne estas produkta?"

"Sed nerekte."

"Eĉ se mi konsentus ke tio kion vi diris estas prava, vi ne taŭgas por laboro en ŝakto, ĉar knabino vi estas. Tie estas ŝakto sed ne oficejo!"

"Knabino! ĉu al la knabinoj estas malpermesite iri en la ŝakton?" mi lin kontraŭparolis.

"Jes, al la knabinoj estas malpermesite tien iri!"

Mi koleriĝis: "Vi malestimas la virinojn. Vere obs. . ."

Mi tiel ofendiĝis ke mi ploris en la ĉambro, sed ekstere la kolegoj tamen ridis. Iu diris: "Jen vera akrulineto!"

La 1-an de dec., 1959

Hodiaŭ favoron donis la maljuna sekciestro, rom-pante la regularon li permesis al ni labori memstare. Oni diris, ke tion mi batalakiris.

Laborinte unu deĵoron, mi sentis koran ĝojon. Kiam mi revenis hejmen en la vespero, la kolegoj ŝerce diris: "Akrulineto, la majuna sekciestro submetiĝis."

Versajne la kromnomo "Akrulineto" estas jam ne rifuzebla!

La 29-an de dec., 1959

"Ĉu vi aŭdis en la disaŭdigo," ridante demandis al mi la maljuna sekciestro, "ke nia minejo plenumis la taskojn de la tuta jaro duonmonaton antaŭdate? Ni ordigu la ĉambrojn kaj celebru la Novjaron en pureco."


Kiam ni ordigis la eluzitajn lampojn, iu kriis tenante en mano cilindran ministan lanternon: "Ah, rigardu! Tia fuŝaĵo!" Kun scivolemo ni kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi kaj ankaŭ la maljuna sekciestro alproksimiĝis pro la bruo. Ekpreninte la lampon li ĝin rigardis atente kaj diris: "Estas nenio nova. Tiaj lumigiloj estis ĝenerale uzataj en la pasinteco."

"Tiel aĝa kiel sendentulo," mi intermetis. "Prefere ĝin forĵetu!" La maljuna sekciestro ĵetis al mi pikan rigardon, kvazaŭ dirante: "Denove estas vi!" Poste li diris: "Kio? Ĝin forĵeti? Ĝi eniĝos en la historian muzeon de nia minejo en la estonteco!" Parolante li kordolore metis ĝin sur bretaron kaj sin turninte al ni li diris: "Ni iom ripozu. Mi rakontu al vi historion.

"Estis aŭtuno en 1943. Tiam mi laboris en la ŝakto. Iu ministro en nia laborteamo nomata Vang estis vundita pro malatento je la brako de ŝtonpeco kaj ankaŭ lia lanterno estis difektita. La japana intendanto tuj donis al li du vangofrapojn kaj poste batadis lin per skurĝo. Ĉies propetoj pruviĝis vanaj. Mi iris por malhelpi lin, sed mem ricevis du batojn. Ĉiuj forte indignis, sed nenion povis diri. Tiam iu ministro Ma el alia min-sekcio ne povis plu toleri tion. Li iris al la diablo, eksvingis pioĉon kaj ekbatis. La kapo de la diablo estis vere tro rompiĝema. Ĝi frakasiĝis je ekfrapo. Vidinte ke lin minacas danĝer-ego, Ma rapide elsaktiĝis kaj forkuris. Oni diris, ke li iris al la Norda Monto kaj aliĝis al la Okavoja Armeo. Lia edzino estis mortigita de la japana ĝendarmaro. La malgranda knabo postlasita de Ma estis kaŝita de aliaj ministoj . . . Ve, kiom ni suferis en la malnova socio . . ." Profunde enpeniĝis la maljuna sekciestro.

La 28-an de sept., 1961

La minejo varbis multe da junaj laboristoj el la ministidoj. Ili estas ĉiuj diplomitoj de la kuranta aŭ pasinta jaro el superaj kaj malsuperaj mezlernejoj. Hodiaŭ kvar novaj laboristoj venis preni lampojn ĉe miagiĉeto. Ili, ĉiuj babilemaj kaj ridemaj junuloj, ĉiam venas kaj foriras kune. Iliaj lamponumeroj estas



Hieraŭ en la disaŭdigo estis laŭdita nova laboristo Ma Hiaŭgjun, kiu peneme lernas metion. Ĉu li estas Ma Hiaŭgjun? Kio estas la nomo de tiu "seriozulo"?

Vespere mi rigardis la filmon "La Ruĝa Gvardio de Hong-lago". Ankaŭ ili iris kaj sidis en la vico ĝuste malantaŭ mi. Mi sentis, ke anstataŭ la filmon ili rigardas min kaj mallaŭte

201-204. "202" estas la plej ŝercema inter ili. Kiam li venis por la lampo hodiaŭ, li kriis: "Hej, lampon, Akrolineto." Fripono, kiel li sciigis pri mia kromnomo? Tamen li estas sufiĉe plaĉa, kun belaj trajtoj. Oni nomas lin "Tenoro". Versajne li povas bone kanti.

"203" havas paron da belaj okuloj. Kun aliaj li estas multe babilema kaj ŝercema, sed tuj fariĝas seriozmiena kiam li vidas min. Lia seriozeco similas tiun de universitata profesoro. Mi volus ridindigi lian afektecon.

La aliaj du ne havas multe da karakterizaj trajtoj . . . Kial mi ekesploris ĉi tion!

La 2-an de dec., 1961

La kvar junuloj estas efektive bonaj. Ekde ilia instaligo ĝis nun, neniu el ili iam malfruiĝis. Hieraŭ neĝegis seninterrompe la tutan nokton, sed hodiaŭ matene la kvaroj venis preni lampojn kiel kutime spite la neĝadon.

Fininte la manĝon post la deĵoro, mi intencis iri glitkuri, sed panjo ne permesis al mi, pledante ke mi estas tro ludema, kio ne konvenas por la knabinoj. Povante fari nenion alian mi do trikis lanfadenajn ŝtrumpojn por la frateto, en la hejmomalliberejo. Fine mi tamen ŝteliris tien, ĉar ankaŭ "202" kaj "203" ŝatas iri tien. Mi ne scias kial mi ĉiam volas vidi ilin.

La 16-an de dec., 1961

"203" venis preni lampon je duono post la kvina kiel kutime. Mirigite mi demandis al li: "Hodiaŭ estas via ferio. Pro kio vi venis?"

Li diris al mi ke lia majstro petis forpermeson pro privata afero en la hejmo kaj ke je la jarfino estas pli bone kun unu plia homo en la min-sekcio. Brava junulo, efektive aktiva!

parolas pri io. Mi penis aŭskulti, sed ne povis aŭdi klare. . . .

Ankaŭ mi ne bone rigardis la filmon. La kantoj en la filmo estas tamen tre belaj. Mi trovu kopion por ilin lerni.

La 24-an de dec., 1961

Kiam mi finis la deĵoron, iu ŝercis kun mi: "Knabinoj plenkreskintaj devas edziniĝi. Akrolineto, ankaŭ vi devas iom aktivi."

"Hm, tamen mi ne volas!" mi kontraŭparolis.

Ankaŭ la maljuna sekciestro kunkantis: "Knabino jam dudekjara, sed aspirata ankoraŭ de neniu junulo. Tro akra vi estas." Lia rimarkigo ekridigis ĉiujn en la ĉambro.

Ĉu vere mi jam devas enamiĝi? Pro kio nun mi pensas pri tio ĉi?

La 25-an de dec., 1961

"203" malfruiĝis. Li estis ŝvitplena pro kurado kaj diris anhelante: "Mi iris renkonti mian patron. Pro manko de tempo li ne povis elvagoniĝi. Li petis min renkonti lin ĉe la stacio."

Ha, lia patro ne laboras ĉi tie. Do kia estas lia okupo? Kiel do li povas esti "laboristo el la familianoj de la ministro"? Vera enigmo.

Kial mi tiel multe zorgas pri li? Mi ne scias.

La 27-an de dec., 1961

Kiel stulta mi estas, ke nur hodiaŭ mi eltrovis rimedon por informiĝi pri li, nome iri al la karbfosejo por esplori la registrolibron de la lampouzantoj.

La ŝercemulo "202" estas nomata Huang Kegjun kaj "203" Ma Hiaŭgjun!

Do ne mirinde, ĉar li estas ĝuste Ma Hiaŭgjun!

La 31-an de dec., 1961

Mi partoprenis en la jarfina vesperkunveno. Ĉe-
estis ankaŭ "202" kaj "203". Ma Hiaŭgjun sin vestis
per blua vatita uniformo. Li ne portis ĉapon hodiaŭ.
Kun la sunbruneta vizaĝo sub la nigra hararo, li
aspektis kaj forta kaj milda. Mi demandis: "Kial
vi ne venis kun viaj danc-akompanantinoj?"

Malgranda Huang ridegis: "Por danci sufiĉas
movi la membrojn. Por kio do danc-akompananti-
noj?" Ektirante min li diris: "Nu, ni iru kune
danci!" Tamen hodiaŭ mi iĝis hontema.

Post Malgranda Huang mi dancis kun Malgranda
Ma. Mi dancis tute senĝene kun Malgranda Huang,
sed kun tre streĉita sento kun Malgranda Ma. Mi
penis teni mian rigardon for de li, sed mi sentis ke
li atente rigardas min. Mi pensis: Rigardu laŭplaĉe.
Sed la koro forte batadis. Konfuziĝis la paŝoj kaj
ardis la vizaĝo.

Ridante li diris: "He, mi volas demandi al vi:
Kiu donis al vi la kromnomon Akrulineto? Tamen
interesa nomo."

Mi ne sciigis al li, sed nur faris longan spiron kaj
diris: "Mi ankaŭ donu al vi kromnomon, kaj"
Mi ĵetis al li subrigardon kaj vidante lin atendanta
mi daŭrigis, "ĝi estu Seriozulego."

Senpripense li diris: "Akrulineto kaj Seriozulego,
do bone. . ." Antaŭ ol li finis la parolon, lia vizaĝo
ruĝiĝis. Rimarkinte ke lia vizaĝo ruĝiĝas, mi sopiris
refoje kaj la paŝoj ne plu konfuziĝis.

Mil diabloj! Kia hazardo, unu -et- kaj unu -eg-.
Tamen kial li ruĝiĝis? Ĉu pro la interrilato de la
du kromnomoj?

La 14-an de jan., 1962

Ma Hiaŭgjun ne venis preni lampon dum tri
tagoj. Li ne povas senkaŭze foresti de laboro. Ĉu
okazis ia akcidento?

Kion nun mi sentas? Kial iom da ĉagreno?

Oni iris rigardi filmon post vespermanĝo. Mi
kvazaŭ vidis ke ankaŭ Malgranda Ma venis. Ĉu
iluzio?

TIAN GIAN:

TARIM*

I

*Legendo diras: Antaŭ tre tre multaj jaroj,
Tarim* aspektis kiel bela florĝardeno.
Kruela Ahun, mastro de brutaroj
pendigis arbe Zorihan-on† per rimeno.
Sed ŝi preferis sorton velk-folian
ol kiel edzon havi ulon tian.*

*Ĉarmegis Zorihan per fein-belo,
du brilaj steloj pendis de l' oreloj.
Samkiel hirundetoj flirtis la hararo
kaj reflektiĝis en la lagspegulo.
Ŝi trile kantis kiel najtingalo:
"Plej bela estas kor" de servutulo."*

II

*Jen venis brava juna servutulo.
Li pafis sagon al la ŝnur-ligito,
kaj tuj rompiĝis la solida ŝnuro
trafite de l' fluganta sag-bolido.
Kaj Zorihan-o falis kaj eksidis
sur jen ĉevalon kiu fulmrapidis.*

*Al la hejmloko Zorihan-o ĵuris,
kaj en arbtrunkon jenon ŝi gravuris:*

*"Revenos mi al via sin', hejmlando,
post kiam malaperos la barbaro."
Ŝi forrapidis sur la galopanto
— ĉe ŝiaj ŝultroj flirtis la hararo.*

III

*Ŝin persekutis Ahun kun kolero.
Hararo ŝia iĝis, ho, rivero.
Muĝegis, hurlis la ondanta fluo,
ĝi glute kovris la fimastran verton.
Disfalas lia krim-palac' kun bruo,
formante tie por jarmil' dezerton.*

*Jarmilojn kuris la ĉeval' sen celo,
rajdiston bravan fine ĝi renkontis.‡
Ĉi tiu ĝin ornamis per or-selo,
arĝenta kondukŝnuro, kaj volontis
resendi per ĝi kun jad-bridrimeno
la belulinon al la nov-edeno.*

— Trad. Laŭlum

* Tarim signifas en la ujugura lingvo: senbrida
ĉevalo.

† Zorihan, nomo de knabino, signifanta en la
ujgura lingvo: stelo.

‡ En la jaro 1956, la Agrokultura Korpuso de
Hingiang komencis batali kontraŭ dezertoj
ĉe Tarim. Oni konstruis multajn irigaciajn
kanalojn kaj akvorezervejojn, kaj sukcesis
elkulturi milionojn da muoj de virga tero..

La 15-an de jan., 1962

Malgranda Ma alvenis al la giĉeto laŭkutime je duono post la kvina.

“Malgranda Ma,” mi demandis, “kial vi ne venis labori la lastajn tri tagojn? Malsaniĝis?”

“Mi iris partopreni en la kunveno de la reprezentantoj de la novaj laboristoj de la minejo. Kial vi ne nomas min Seriozu . . . ?” Antaŭ ol li finis la parolon, mi ekmansvingis kaj li forkuris kapbalancante.

La 3-an de feb., 1962

Hodiaŭ estas sabato. Morgaŭ estos la 30-a de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro. Enkalkulante la tri feriojn de la Printempa Festo, la libertempo daŭros entute kvar tagojn. Kiel pasigi tiujn ĉi kvar tagojn? Legi, glitkuri, rigardi filmon. . .

Iu amikino invitis min al danco, sed mi ne akceptis. Montrante al la portreto de Malgranda Ma sur la honor-tabulo, ŝi diris: “Vi ne iros sen li!”

Ĉu vere? Ĉu Malgranda Ma revenos je la Printempa Festo?

Antaŭ duonmonato la teknik-diskoniga teamo de la mina distrikto venis al la minejo. Malgranda Ma ekplaĉis al la labor-spertulo Li Ĉangjun, kaj tiu ĉi prenis lin sia metilernanto. Ili nun rondvizitas frajtajn minejojn por interfluigi spertojn.

Kiam Malgranda Huang redonis lampon antaŭ du tagoj, li diris: “Akrolineto, ĉu vi volas skribi leteron? Mi scias la adreson de Seriozulego. Nun mi oficiale deklaras al la fraŭlino mian retiriĝon!”

Mi afektis koleron. Li forkuris postlasinte slipon sub la lampo. Mi rigardis la slipon — efektive estis la adreso de Malgranda Ma.

Mi skribis leteron tiuvespere. Provinte du fojojn finfine mi pretigis tekston. Sed poste mi denove ĝin disŝiris. Mi ne scias kial mi tre volas ekplori.

La 4-an de apr., 1962

Posttagmeze okazis kunveno de la liganoj*. La knabinoj en la sekcio de ministaj lampoj estis juĝitaj progresinta ruĝflaga grupo. Malgranda Ma kaj liaj kunuloj estis juĝitaj ruĝflaga grupo, kaj li mem estis juĝita ligano kun kvin bonoj. Li eĉ faris paroladon sur la podio. Li parolis balbute kun ruĝiĝinta vizaĝo. Malgranda Huang palpebrumadis kaj ridadis malproksime. Sed mia nervaro estis tiel streĉita kiel la lia. Iam ŝajnis al mi ke ĉiuj min rigardas kaj la koro bategis.

Post la kunveno mi estis eksterordinare ĝoja. Ĉe mia reveno al la hejmo, panjo diris: “Ha, vi laboris

* T. e. membroj de la Komunisma Junulara Ligo.

tre bone, ke vi estas honore nomita progresinta grupo.” Mi demandis: “Kiel vi sciiĝis?”

“El la disaŭdigo!” respondis panjo ridanta. “Iru vespermanĝi. Mi preparis speciale por vi la ŝatatajn sukerkukojn.”

Kiam mi vespermanĝis, paĉjo ridis kaj diris ke panjo bone plenumas la laboron de familiano sed tro dorlotas min. Li avertis, ke ŝi zorgu ke mi ne estu malbonigita pro tio.

La 17-an de maj., 1962

“Malgranda Ma vundiĝis dum laboro!” diris Malgranda Huang, kiam li transdonis al mi la du lampojn. Li petis, ke mi iru kun ili por viziti Malgrandan Ma-n. Sed mi ne havis kuraĝon iri kaj senkonsile rigardis ilin foriri.

Konfuzo regas en la koro. Mi multe pentis. Kial mi ne iris vidi lin? Ĉu pro hontemo?

Vespere mi manĝis malmulte. Panjo maltrankvile demandis, ĉu mi malsanas. Ve, panjo, vi ja ne komprenas la koron de la filino!

La 19-an de maj., 1962

La maljuna sekciestro venis al mi kaj diris: “En la karbofosa distrikto okazos kunsido de familianoj de la ido-ministoj. Vi agu kiel gastiganto.”

Tian komision mi volonte plenumos.

Ĉe la komenco de la kunsido la prezidanto de la sindikato laŭdis la atingojn de la novaj laboristoj kaj aldonis, ke tiaj atingoj estas ne apartigeblaj de la edukado fare de la familestroj. Kiam li tuŝis la vundiĝon de Ma Hiaŭgjun dum laboro, miaj pensoj forvadis.

Kiam komencis paroli la familiano de Ma, miaj pensoj estis rekolektitaj.

La maljuna onklino diris: “De sia juneco Hiaŭgjun kreskas ĉe ni. Lastan jaron li estis diplomita el supera mezlernejo. Ni volis, ke li partoprenu eniran ekzamenon de universitato, sed li diris, ke li volas labori en la ŝakto. Tiam mi ne multe tion aprobis, timante ke okazos al li ia akcidento, pro kio mi havos maltrankvilan konsciencan antaŭ lia patro. Mia maljunulo kritikis mian malnovan pensmanieron, dirante: ‘Ni ĉiuj maljuniĝis. Kiuj transprenu niajn laborojn, se ne ili? Alie, ili ne estus nomataj laboristoj el la ministidoj! En la ŝaktoj ne estos permesite al la novaj laboristoj labori en lokoj danĝeraj. Ĉio estos bone klarigita al ili antaŭ ol ili laboros kune kun la malnovaj laboristoj. Krome, troviĝas regularo por sekureco. Pro kio vi ankoraŭ maltrankviliĝas!’ Mi pensis, ke li estas prava. Se la filo tion volas, ni do lasu lin labori. Oni estas ekster danĝero laborante laŭ la regularo por sekureco. Kie troviĝis regularo por sekureco en la malnova socio? Eĉ hodiaŭ la

brako de mia maljunulo ankoraŭ ne funkcias bone? En la pasinteco, vundiĝinte je la brako, oni ankoraŭ devis ricevi punbatadon. Nuntempe ricevinte nur vundeton, li jam estas permesita ripozi, kaj ne labori antaŭ ol li estos kuracita. Por knabo ne gravas vundeto. Li kuraciĝos ankaŭ de tia malzorgemo.”

Finaŭskultinte la parolon de la onklino, mi falis en dubon. Ĉu Malgranda Ma ne estas ŝia filo? Kio estas tio efektive? Kiel terure mi sopiras vidi vin, Ma Hiaŭgjun! Eble la doloro de via vundo ne estus tiel akra kiel la mia. Ĉiel ajn mi iros viziti lin morgaŭ post laboro.

La 20-an de maj., 1962

Kiam Malgranda Huang venis redoni la lampon, mi petis lin gvidi min al la hejmo de Malgranda Ma. La ŝercemulo diris, ke tia afero ne permesas la partoprenon de tria persono kaj aldonis, ke li jam retiriĝis. Post kiam li sciigis al mi la adreson, li eksvingis la manon kaj forkuris.

“Tio bezonas kuraĝon,” diris la maljuna sekciestro, kvazaŭ li ankaŭ sciis tion.

Alveninte al la pordego, mi denove ŝanceliĝis. Mi demandis min mem: “Ĉu tio vere bezonas kuraĝon?” Do mi daŭrigis mian vojon spite.

Kolektinte mian kuraĝon, mi eniris la korton. Ekvidinte min, li estis tre ĝoja kaj kriis laŭte: “Panjo, venas gasto!”

Kiam la onklino vidis min, ŝi diris ridante: “Ha, tiun ĉi knabinon mi vidis hieraŭ.”

Mi salutis ŝin kapbalance. Ŝi sekvis min en la ĉambron kaj diris ridante: “Hieraŭ vi gastigis min, sed hodiaŭ mi gastigu vin. Ne foriru! Mi iras prepari manĝon por vi. Ne foriru, nepre ne!” Post kiam la onklino forlasis la ĉambron, Malgranda Ma ŝerce diris: “Akrolineto, kiel ĝentila vi fariĝis hodiaŭ, estante honora gasto!”

“Ne ŝercu!” mi diris. “Mi volas interparoli kun vi serioze.”

“Nu,” li diris, “ankaŭ vi fariĝis serioza!”

Sub mia serioza rigardo li vere serioziĝis. Sekve li konigis al mi la historion, kiun la maljuna sekciestro rakontis al mi kiam mi ĵus venis al la minejo. Fakte la laboristo nomata Ma estas ĝuste la patro de Hiaŭgjun. Post la morto de sia patrino, Hiaŭgjun plenkreskiĝis sub la zorgado de Maljuna Vang kaj lia edzino, kiuj amas lin kiel sian propran filon.

Nur tiam mi komprenis kial li iris al la stacio por renkonti sian patron kaj kion diris la onklino ĉe la kunsido. Eklevinte la kapon, mi vidis portreton de subkolonelo pendigitan sur la muro. Mi pensis, ke eble tiu estas la patro de Malgranda Ma. Mi fingre ekmontris al ĝi kaj li kapjesis.

Dum la vespermanĝado la onklino ĉiam fikse rigardis min, kio terure min hontigis.

ĈINAJ POŝTMARKOJ

La 54-a serio de poŝtmarkoj speciale emisiita (1-VI-1963) de la Ĉina Poŝto pri infanoj, la originala formato estas 30 × 48 cmm.



Ĉe mia foriro, ekster la pordego, mi ŝtele enŝtopis en lian manon mian foton faritan dum la ŝargado de akumulatoroj kiun oni publikigis en la ministra ĵurnalo.

La 29-an de maj., 1962

Hodiaŭ li venis al laboro. Ricevinte la lampon, li donis al mi paketon. Timante ke eble iu tion rimarkos, mi rapide metis ĝin sub la lignan bretaron. La koro batadis.

Tagmeze reveninte hejmen mi ĝin malpakis. Ha, estis argila pupo. Brava knabo, vi sin distras per modlado de argilaĵo pro senokupateco en la hejmo! Kiam mi rigardis pli detale—ho, la figuro prezentas ĝuste min. Du harplektaĵoj, ovala vizaĝo, efektive ili iom similas al miaj trajtoj, nur la nazo.... Krome, mi trovis en ĝi ankaŭ foton de li kun lia patro.

En la vespero, post la manĝo, paĉjo diris emociplene: "Du generacioj de ministoj, du malsamaj mondoj kaj du malsamaj specoj de pensoj kaj sentoj. Dum mia juneco mi sciis nur elfosi karbon. Eĉ por perlabori manĝon oni trovis la tempon ne sufiĉa, kiel oni povis havi libertempon por knedi argilan statueton?"

Ho ve! La sekreto malkaŝiĝis. Kion fari? Kredeble panjo tion eldiris. Kion fari se li ne aprobas?

Tiam paĉjo laŭte demandis al mi: "Kiu estas li, la modlinto de la argila statueto?"

"Ma Hiaŭgjun," mi diris kun profunde klinita kapo kaj koro eksplodonta. Post momento, mi ĵetis ŝtelrigardon al paĉjo. "Ma Hiaŭgjun, la filo de Maljuna Ma!" ridis patro. Verŝajne li konas ilin. Ŝajnis al mi ke li konsentas. Nur tiam mi ekspiris libere.

La 12-an de jul., 1962

Malgranda Ma diris al mi, ke lia patro pretervojaĝos ĉi tien pro oficiala komisiono kaj devagoniĝos ĉi tie por vidi malnovajn amikojn kaj profitante la



ŝancon ankaŭ vidi vin. Li aldonis, ke lia patro konas la mian.

Do ankaŭ la knabo malkaŝis la sekreton.

Tio estas efektive malfacila problemo, sed, "Malbela bofilino ja devas renkonti sian bopatrino."

Mi decidis iri al la maljuna sekiestro kaj peti lin doni al mi la malnovan ministan lampon, ke mi donacu ĝin al Ma Hiaŭgjun.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Lernolibroj por Mongolaj Studentoj

Kompleta serio da lernolibroj por elementaj kaj mezaj lernejoj en la mongola lingvo estas kompilita en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ĉiuj lernobjektoj de la koncernaj lernejoj estas inkluzivitaj en la serio, kaj iliaj enhavoj speciale konformas al bezonoj de la mongolaj studen-


toj. Tio estas la unua fojo en la historio, ke studentoj en la Interna Mongolio havas kompletan serion de lernolibroj en sia propra lingvo.

Fama Lama-templo Bone Riparita

En la naskiĝloko de Conkapa, fondinto de la flava sekto de lamaismo en Ĉinio estas fama lama-templo Gungum-templo. Ĝi

situas 25 km. sude de Hining, la ĉefurbo de Kinghaj-provinco kaj estas konstruita en la deksesa jarcento. Nun tiu ĉi plej granda malnova konstruaĵo estas riparita laŭ ĉiuj ebloj. La orbrila tegmento de la templo rebrilas sub sunlumo, ankaŭ la tegment-subtenaj trabaroj, karakterizaj de la tradicia ĉina arkitekturo, estas bonege riparitaj.

BOVO



MI ŝatas la bovon, ne nur pro tio, ke ĝi estas bruto milda kaj diligenta, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi forlasas sian dormejon en frumateno.

La ĉambro, en kiu mi loĝis, situis apud la vojo. Ĉiun frumateno mi estis vekita de brua paŝado. Tio estis la paŝado de la bovoj de la produkta grupo, kiuj, frapante per siaj hufoj la ŝtonplatan vojpaŝimon, pasis preter mia fenestro por iri trinki akvon el la rivero. Mi puŝmalfermis la fenestron. La ĉielo, kovrita de grizenigra vualo, ankoraŭ ne tute elkrepuskiĝis. Enŝoviĝis en la ĉambron freŝa aero, miksitita kun rizpajlaodoro kaj parfumo de oni ne scias kia floro. Ie virkoko eligis mallongan ekkrion, kaj alia respondis al ĝi per krio tirata kaj pli laŭta. Tuj sekve, ĉie sonis kokokantoj: raukaj, sonoraj, lertaj, kaj ankaŭ mistonaj de senspertaj kokidoj. Kaj de tiu ĉi ĥoro vekigis la vilaĝo.

Nia produkta grupo havis sume dek unu bovojn kaj kvar viglajn

bovidojn. Ĉiumatene, kiam mi iris al la rivero por lavi al mi la vizaĝon, mi trovis ilin jam starantaj en ĝi, proksime al la bordo.

Iuj akvon trinkis, kun kapo klinita; iuj lekis karese unu alian, muĝetante de tempo al tempo. Petola bovido naĝis ĝis la centro de la rivero, aperigante nur la spinlinion de la dorso kaj la naztruojn, kaj brue ŝprucigante akvon per la buŝo fojon kaj refojon. La alcionoj daŭrigis sian ludadon apud la bovoj, rapide flugtuŝante la akvosurfacon, kvazaŭ ili sentus nenian timon al tiuj kolosoj.

Kiam la bovoj trinkis sufiĉe, la paŝtisteto ilin vokis, kaj, ĉe ektiro de la ŝnuroj ilin ligantaj, ili revenis al la bordo kaj estis diskondukitaj de membroj de la popola komunumo por la laboro de la tago. Nun la suno ankoraŭ ne elmontris sian vizaĝon; la aŭroro nur koloris la orientan horizonton, lasante ankoraŭ kelkajn stelojn palpebrumantaj sur la malhele blua firmamento.

Ĉiumatene, mi estis vekita senescepte de la paŝado de la bovoj. Tiuj laboremaj kaj mildaj bestoj, ĉiam akurate tuj antaŭ la tagiĝo, iris silente al la rivero por akvon trinki. Ili neniam malfruis, ĉu en serena vetero, ĉu en vento kaj pluvo; kiel en printempa varmeto, tiel ankaŭ en frosto vintra. La paŝtisteto diris al mi, ke ilia kondukanto estas maljuna bovino, kiu, en ĉiu frumateno, laŭte ekmuĝas, puŝmalfermas per la kornoj la lignan pordon de la stalo kaj, sekvate de la ceteraj bovoj, trankvile paŝas al la rivero.

Iun matenon de frua printempo, mi vekigis de forta tondrado. Tio estis traktoroj! Jam kelkajn

tagojn antaŭe mi estis aŭdinta, ke la gubernia traktora stacio sendos traktorojn por helpi nian plugadon; sed mi ne atendis, ke ili venos tiel frue — eĉ la fruemaj bovoj ankoraŭ ne paŝis preter mia fenestro!

Mi tuj vestis min kaj rapidis al la vojo! Sur la kampo estis plugantaj tri "Ruĝa Oriento"-traktoroj, post kiuj ruliĝis nigraj ondoj vaporantaj. Min rimarkinte, la traktoristoj etendis la manon por min saluti. Unu el ili estis knabino de nia propra vilaĝo.

La vilaĝo vekigis, ne de la kokerikoj, nek de la bovopaŝado, sed de la motorbruo de la traktoroj. La homoj, plenaĝuloj kaj infanoj, amasiĝis kaj admiris en la matenruĝo la laboradon de la maŝinoj. Ne povante sin deteni, oni ĝojkriadis.

Kaj niaj bovoj? Kontraŭkultime, anstataŭ iri al la rivero, ili staris ĉe la vojo kaj fiksis siajn obeemajn okulegojn al la monstroj sur la kampo. Komence ili kvazaŭ sentis iom da timo kaj maltrankvilo; sed post kelka momento, ili jam kutimiĝis al la bruado kaj senĝene rigardadis la tien kaj reen kurantajn traktorojn.

Kiam mi, vizaĝon lavinte, direktis min al la kampo, mi trovis, ke la bovoj kaj la traktoroj estis tie kune laborantaj.

Nun delonge mi ne loĝas en la ĉambro apud la vojo. Sed mi ankoraŭ ofte rememoras la paŝadon de la bovoj, kiam mi vekigis frumatene.

KOREKTO

** En la 7-a linio demal-supre de la dekstra kolono sur paĝo 113 de la lasta numero de nia gazeto la vortoj "ili postenis en 7, sept., 1959" devas esti legataj "ili postenis en 7, nov., 1959".*

** La klarigo de la unua bildo sur p. 103 de la lasta n-ro de nia gazeto devas esti legata "Ĉinaj sciencistoj jam sukcesis en bredado de oraj abeleteoj (Dibrachys cavus Walker) por ekstermi ruĝajn kotonfruktajn vermojn (Platyedra gossypiella saunders). . . ."*

Ĉarmaj Silkpupoj

RIGARDU la hom-figurojn en la bildo! Ĉu ili ne similas al veraj herooj en ĉinaj operoj?

Vidu, la virino kun plukmuzikilo en la brakoj estas Ĝeng Jing-jing, ĉefrolulino de la opero "Plukmuzikilo". Ŝi havas sur si helbluan silkveston, kaj gazjupon delikatan kiel la flugilo de cikado. Ŝajnas ke ŝi estas elversanta siajn korajn sentojn per la muzikilo.

La alia estas princino Venĉeng kiu staras kun perla kroneto kaj gaza ŝalo sur la kapo kaj en vesto ornamita per feniksobrodaĵo. Ŝi havas en la manoj spadon kaj spegulon. Ĉarma rideto ludas sur ŝia vizaĝo, kaj gracia estas ŝia teniĝo.

Jen estas knabinoj en la konata danco "Te-rikoltado kaj Kaptado de Papilioj", kiuj kun bela korbo surbrake kaj kunfaldebla ventumilo en la mano kvazaŭ faras malpezajn dancopaŝojn kaj kantas bele.

Kiel bele aspektas ĉi tiuj junulinoj en la teatra kostumo. Ili

"La Feino Disŝutas Petalojn"



vere similas al vivantaj. Sed ili estas nur pupoj unu futon altaj, faritaj el silko kaj gazo.

Laŭ historiaj dokumentoj, dum Norda Song-dinastio en Ĉinio jam troviĝis libroj, menciantaj ke oni tondas silkaĵon por fari pupon kaj tranĉas brokaton por fari ĝian veston. Sed jam de longe perdiĝis aliaj materialoj pri tia amuzilo de la regantoj de tiu tempo. Dum pluraj centoj da jaroj, restis nek tia pupo, nek priskribo pri ĝia far-metodo.

La belaj figuroj en la bildoj estas verkoj de kelkaj dommastrinoj de Pekino — nome Ge Ĝing-an, Li Pejfang kaj aliaj. Tiujn pupojn ili kreis post pena studo kaj provado.

La silkpupoj plejparte prezentas belulinojn en antikva kostumo, kiel vidatajn en la teatraĵo, kaj aktorinojn de modernaj dancodramoj kaj virinojn de naciaj malplimulto. La materialo uzita en farado de la silkpupoj konsistas el silkaĵo, gazo, kotonteksaĵo, ktp.




Ĝeng Jingjing de la opero "Plukmuzikilo"

La farado de tia silkpupo estas arto sinteza. Ĝi postulas multflankan scion kaj grandan lertecon. Ekzemple la vizaĝaj trajtoj kaj esprimo, gestoj de la korpo kaj la membroj, ĉio ĉi tio nepre devas esti konformaj al la psiko kaj sentimento de la roluloj en la teatraĵo; la har-aranĝo kaj kostumo devas esti konformaj al la stato kaj situacio de la roluloj, kaj al la historia fono; la proporcio inter ĉiuj korpopartoj postulas subtilan aranĝon kaj eĉ la ornamaĵoj de la kostumo devas esti aldonitaj post zorga pristudo.

Estas tre interese, se oni vizitus ilian laborejon por trarigardi. Pliparte el la grupaninoj jam atingis mezan aĝon, kaj kelkaj havas eĉ pli ol kvindek jarojn. Ili laboras super diversaj mate-

rialoj kaj pupopartoj. Iuj faras kapojn kaj membrojn, aliaj kudras por ili jakojn kaj jupojn, triaj desegnas brovojn kaj tempiharojn, kombas kaj aranĝas iliajn harojn, kvaraj surmetas al ili kostumojn, ornamas ilin per perloringo, kaj ankoraŭ aliaj ordigas al ili la gaz-ŝalon, ĝustigas la teniĝon tiel zorgeme, kiel oni beligas la verajn aktorojn en tualetĉambro de teatro.

Post kiam ĉi tiuj dommastrinoj komencis la faradon de silkpupoj en 1955, iliaj artkreaĵoj jam gajnis bonan reputacion ĉe la Internacia Ekspozicio de Infanaĵaj Pupoj, okazinta en la sama jaro. Iliaj metiartaĵoj estis ekspozici-



ciitaj ankaŭ en Hindio, Indonezio, Hungario, Germanio, Anglio kaj aliaj landoj dum la lastaj jaroj,

senescepte ili ricevis admiron de la rigardantoj kaj oni eĉ ilin filmigis por ĝuo de la publiko.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Elektitaj Primilitaj Verkoj de Maŭ Zedong en la Angla Lingvo

En aprilo eldoniĝis en Pekino anglingva traduko de *Elektitaj Primilitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. Ĝin eldonis la Fremdlingva Eldonejo. La libro enhavas 29 primilitajn verkojn de prezidanto Maŭ Zedong elektitajn el la kvar volumoj de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*.

Pli da Filmoj por la Kamparo

La kampara loĝantaro de Ĉinio povos ĝui pli multe da sciencaj filmoj ol antaŭe en la kuranta jaro. Laŭ informo de koncerna instanco en 1963 por la kamparaj regionoj estos 150% da sciencaj kaj klerigaj filmoj kaj 20% da rakontaj filmoj plimulte ol en 1962.

Por tio oni sendis al la kamparo 300 filmo-projekciilojn por ekipi novajn filmo-projekciajn trupojn. La cirkulantaj filmo-projekciaj trupoj en la kamparo nun nombriĝas ĉirkaŭ 9000. Ilia laboro ebligas la kamparanojn ĝui filmojn en sia propra vilaĝo.

Popularaj Sciencaj Libroj por Infanoj

Multaj libroj de scienca literaturo por infanoj estas eldonitaj de la Ŝanhaja Infana Eldonejo. Famaj sciencistoj, verkistoj kaj profesoroj de Ĉinio fervore kunlaboris en la eldonado. Parto de la serio de 100 libroj pri naturaj sciencoj estas jam eldonita. La libroj en la serio donas fundamentajn konojn pri diversaj kampoj de la natura scienco. Aliaj serioj kiel "Sciencaj Enigmoj", "Centmil 'Kial?'" ankaŭ ricevas vastan aprobon. La lasta serio en ok volumoj, preparita de 250 ĉinaj sciencistoj, forvendiĝis baldaŭ post sia eldoniĝo.

Pentraĵoj de Fama Ĉina Pentristo

En la mezo de aprilo en Pekino okazis ekspozicio de pentraĵoj de fama ĉina pentristo Lin Fengmian. Li estas maljuna pentristo. Antaŭ 40 jaroj li lernis ole-pentrarton en Francio. Reveninte al Ĉinio li instruis belarton por dekoj da jaroj. En la longdaŭra

praktikado, li formis sian propran stilon en la pentrado de pejzaĝoj, senmovaj objektoj, homfiguroj kaj birdoj kaj floroj, asimilante bonajn karakterizojn de la pentradoj fremdlandaj kaj tradiciaj de la patrolando. Tial li povas esprimi ordinarajn objektojn per tute freŝa maniero. Ekzemple en liaj pejzaĝaj pentraĵoj oni sentas poezian atmosferon kaj lirikan belon.

Kurso por Famaj Kantistoj

Je la 2-a de aprilo fondiĝis en Huhehot, ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, progrese kurso por kantistoj. Ĝin partoprenis dek du esperplenaj junaj gekantistoj, inkluzive Bojan Delger, la antaŭa ŝafistino, kiu ricevis la unuan premion en la Kvina Tutmonda Junulara Festivalo en Varsovio.

Ĉiuj studentoj de la kurso estas elektitaj el membroj de artaj trupoj kaj ensembloj. Koncerne naciecon, tie troviĝas mongoloj, dahuroj, ovenkeoj kaj aliaj naciaj malplimultoj.

BOTANIKA ĜARDENO EN TROPIKA

TEKSTO KAJ FOTOJ DE ĴU SJUCU

*“Homalium laoticum”,
antikva arbo deveninta
de la Glacirivera Epoko.*

Foto de Ĵu Sjucu

LA Ĉina provinco Junnan kun riĉa provizo de vegetaĵoj estas jam delonge frekventejo de ĉinaj kaj fremdlandaj botanikistoj. Sed Sipsŭanbanna, situanta en la plej suda parto de la provinco, estis apenaŭ konata pri sia ĉarma naturo en la pasinteco pro la trafika malfacilo kaj izoleco. Post la naskiĝo de nova Ĉinio, la Ĉina Akademio de Sciencoj faris vastan esploradon de la tieaj vegetaĵoj kaj trovis ke la kreskaĵoj en Sipsŭanbanna estas ne nur grandnombraj sed ankaŭ multspecaj kaj ĉirkaŭ 200 specioj el tiuj vegetaĵoj etsas

eĉ neniam antaŭe enskribitaj en la botanika literaturo.

La plej grava malkovro en Sipsŭanbanna de la botanikistoj estas la virga tropika musonpluva arbaro en sia sufiĉe bona konserviĝo. Por pli bone protekti tiun trezoron de la naturo kaj krei por la sciencistoj avantaĝajn kondiĉojn studi tropikajn vegetaĵojn, oni jam starigis en Sipsŭanbanna kelkajn regionojn de natur-konservado dum la lastaj jaroj. En 1959, la Ĉina Akademio de Sciencoj establis tie ankaŭ la Tropikan Botanikan Ĝardenon.

La ĝardeno havas sume pli ol 1,500 specojn da vegetaĵoj, el kiuj parto estis konservita en la originala sovaĝa arbaro, parto estis transplantita el proksimaj arbaroj kaj la ceteraj estis enkondukitaj el aliaj lokoj en- kaj ekster-landaj.

Estas tre allogaj la pompaj floroj de la tropiko en la “ekspozejoj” de la botanika ĝardeno. Ekzemple la “laktogerbo”, “lustrofloro”, “glorlilio”, k. a. ĉarmas per siaj brilaj koloroj kaj strangaj formoj. Tie staras

giganta banjano, kies trunkon povas kune ĉirkaŭbraki nur dekelkaj homoj kaj multaj stilz-radikoj kaj lianoj pendantaj de ĝiaj branĉoj prezentas kvazaŭ arbareton. El la dekoj da specoj de vegetaĵoj kreskantaj sur ĝi, pli ol 20 apartenas al la orkidea familio. Tie troviĝas kreskaĵoj, kiujn la botanikistoj nomas “strangolistoĵ”. Ili estas “demonoj” en la arbaro kaj neniu arbego povas kontraŭstari ilian atakon. Estas alta “grapola figarbo”, kiun konkure strangolas du strangolisto-figarboj. Ĉi tiuj forte premvolvas ĝian trunkon kiel boaoj kaj laŭdire la “grapola figarbo” fariĝos ilia viktimo nur post kelke da jaroj.

Estas tre interese por la vizitantoj ke en la ĝardeno troviĝas tiaj antikvaj arboj kia *homalium laoticum* deveninta de la Glacirivera Epoko. Tiuj antikvaj arboj fariĝis jam delonge fosiliaj specimenoj en aliaj lokoj de la mondo, sed en Sipsŭanbanna ili ankoraŭ fortike kreskas. Tiu speciala fenomeno en Junnan-provinco montras ke kiam la vegetaĵoj en plejparto de la mondo estis pereigitaj dum la severa Glacirivera Epoko, Junnan estis escepte ne trafite de la kataklismo. Tial multaj vegetaĵoj tie vivantaj havas historion de antaŭ la Glacirivera Epoko.

La “ekspozejo” estas ĉirkaŭata de la tropika musonpluva arbaro, kie la vegetaĵoj kreskas tiel dense ke la sunradioj malmulte enlasiĝas. Por akiri sunlumon ĉiuj arboj sin etendas kiel eble plej alten kun siaj branĉoj kaj folioj plejparte ĉe la supro. Tial la arboj estas ĝenerale altaj kaj rektaj, ekzemple la hinda migdalarbo kaj la koralarbo estas pli ol 30 metrojn altaj. Por subteni siajn gigantajn trunkojn ili staras tenate per abutmentaj radikoj. Tio estas alia speciala fenomeno en la tropika arbaro.

Oni vidas en tiu arbaro ankaŭ multspecajn parazitajn kreskaĵojn apartenantajn plejparte al la filika kaj orkidea familioj. Ili parazitigas sur la trunkoj de aliaj vegetaĵoj, sorbante akvon kaj nutraĵojn el la aero per siaj aeraj radikoj kaj parto el ili vivtenas sin per putraĵoj de vegetaĵoj. La nesto-filiko kiu parazitigas sur liano, aspektas kiel florkorbo pendanta en la aero. La vivforto de tiaj vegetaĵoj estas sufiĉe granda. Iu laboranto de la botanika ĝardeno foje metis specimeno de vegeta parazito el la orkideacoj en sian albumon kaj post longa tempo li trovis ke ĝi ne nur ne velkis, sed elkreskigis novajn foliojn.

La abundeco de la grimptrunkaj vegetaĵoj estas ankaŭ karakteriza trajto de la tropika arbaro. Laŭ nekompleta statistiko la lianoj en Sipsŭanbanna nombriĝas je ne malpli ol 100 specoj. Ili volviĝas sur la trunkoj de arbegoj kiel boaoj kaj pendas malsupren en la aero de branĉoj pli ol dek metrojn altaj.

BARBARO

Fotoj de Ĵu Sĵucu

La rivero Luosuo
fluanta ĉirakŭ la
Botanika Ĝardeno.



Lustrofloro (*Hibiscus schizopetalus* — Masters — HK. f.)



La fama tropika ren-frukta arbo (*Anacardi
Occidentalis* L.)





Ole-kukurbo (*Hodgsonia macrocarpa*) estas nove trovita ole-plantajo.




Alocasia

Ĉapo-fungo (*Diclyphora* Sp.)




Plumeria rubra L. var acutifolia






ora C. Koch.



Ina kariko.

hata poir Bailey.



Vira kariko.





Laktoherbo (*Caesal-
pina pulcherrima* SW.)

Jatropha Podigica HK.



Arbo kies brančego fruktas.



Troviĝas tie speco de vegetaĵo kiun la botanikistoj nomas "ekburĝonportanto sur la trunko". La fruktojn ne portas la branĉoj sed la trunko. Inter tiuj vegetaĵoj sin trovas, ekzemple, la "grapola figarbo" kaj *baccanrea sapida*.

Dank' al la alta temperaturo kaj humideco, la neesto de la uraganoj kaj la moderiga influo de la nebulo dum la seka sezono kiuj estas tre bonaj kondiĉoj por la vegetaĵoj, la plantaĵoj en Sipsŭanbanna kreskas kun tre miriga rapideco. La tropika fruktarbo papajo, ekzemple, povas produkti fruktojn en la sama jaro de la semado.

En la botanika ĝardeno sin trovas krome multaj plantaĵoj kun granda ekonomia valoro kiaj estas

plantaĵoj de olea, medicina kaj aroma krudaĵoj. Inter ili la plej rimarkinda estas la ole-kukurba arbo (*Hodgsonia macrocarpa*), ligna liano kun semoj entenantaj 70-80 elcentojn da oleo, tre bona por nutrado. Kvankam tiu ĉi vegetaĵo estis trovita en Sipsŭanbanna jam antaŭ 20 jaroj, tamen nenies atenton ĝi ricevis en tiu tempo. En la lastaj jaroj, laborantoj de la botanika ĝardeno jam rikoltis certan sukceson en siaj eksperimentoj de transemado kaj kulturado de la plantaĵo. Kaj nun per branĉoplantado ili jam povas multigi la plantaĵon kun viviĝoproporcio de pli ol 50 elcentoj. Krome en la ĝardeno kreskas ankaŭ tre multe da plantaĵoj enkondukitaj de la tropikaj Afriko kaj Suda Ameriko.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Novaj Specioj de Silkraŭpoj

Kvar novaj specioj de silkraŭpoj estas bredataj en la Eksperimenta Stacio de Silkraŭp-kulturo en Siĉuan-provinco, unu el la ĉefaj silkproduktaj regionoj de Ĉinio. Tiu ĉi nova specio produktas 30% pli multe da silko ol la lokaj specioj.

Ĉinaj Islamanoj al Meko

En aprilo ĉijare unu Ĉina Islama Delegacio gvidata de Ju Ĉanlin pilgrimis al Meko en Saŭdi-arabio. Ĉe la pekina aerodromo tiun delegacion adiaŭis Mohamed Ali Ĝang, vicprezidanto de la Ĉina Islama Asocio.

Popularaj Noveloj Adaptitaj al la Tradicia Rakontarto

Estas diversaj formoj de tradicia rakont-arto en Ĉinio. Multaj el ili estas melodijaj; iuj prenas ankaŭ formon de arta deklamado, kaj ili estas nomataj ĝenerale Ĉjuji, t. e. melodijaj rakontadoj. La rakontadoj estas ofte akompanataj per simplaj muzikiloj, ekz-e klakiloj, tamburetoj aŭ iaj kordmuzikiloj.

Tiu ĉi arta formo estas tre populara inter la kamparanoj kaj aliaj laborantaj popolanoj. Antaŭ la Liberiĝo, la rakontoj de tiu ĉi arta ĉefe temis pri kavaliraĵoj kaj aventuroj. Sed nun multaj famaj modernaj noveloj adaptiĝis al tiu ĉi arta formo. Laŭ statistiko, la

nombro de la adaptitaj modernaj noveloj bone akceptitaj de la aŭdantaro atingis kvardek sep. Ili priskribis heroajn agadojn de la popolo en la bataloj por liberigo de la patrolando kaj konstruado de socialismo. El la plej sukcesaj oni povas citi la jenajn romanojn: "En la Profunda Arbaro kaj sur la Neĝa Stepo" pri eliminado de kuomintangaj banditoj en la Nord-oriento de Ĉinio en la kvardekaj jaroj, "Gerila Taĉmento ĉe la Fervojo" pri rezista batalo kontraŭ la japana invado, kaj "Ruĝa Roko" pri heroa batalo de ĉinaj komunistoj en Ĉiang-kajŝek-Usona koncentrejo en Ĉungkino, Siĉuan-provinco antaŭ la Liberiĝo.

Ekspozicio de Britiaj Akvareloj

Je la 1-a de aprilo komenciĝis Ekspozicio de Britiaj Akvareloj en Pekino, sub la aŭspicio de la Ĉina Popola Asocio por Kulturaj Rilatoj kun Fremdlandoj kaj la Unuiĝo de Ĉinaj Artistoj. Pli ol 150 akvareloj de britiaj pentristoj en la lastaj tri jarcentoj estis ekspoziciataj. Por preparado de la ekspozicio angla pentristo Richard Cotton Carlisle, prezidanto de la Arta Komitato de la Britia-Ĉinia Amikeca Asocio venis jam antaŭe al Pekino.

Agronomia Eksperimentado en la Komunumoj


Lasttempe en popolaj komunumoj kaj ŝtataj farmoj ĉirkaŭ Pe-

kino establiĝis multaj novaj agronomiaj eksperimentaj centroj de agrikulturaj institutoj kaj kolegioj.

Plejparto de la laborantoj de la eksperimentaj centroj estas junaj sciencistoj kun helpo de la lokaj kamparanoj. Iuj el ili estas funkciigataj sole de junaj kamparanaj teknikistoj.

Foraj Regionoj — Abundaj je Riĉaĵoj

Du trionoj de la vasta ĉina teritorio estas ĝis nun ankoraŭ tre malmulte ekspluatataj. Tiaj estas la nordaj, sudaj kaj okcidentaj foraj provincoj. Antaŭe oni opiniis, ke al tiuj regionoj mankas naturaj riĉaĵoj kaj kulturebla tero, sed fakte tie ekzistas granda ebleco por agrikulturo, bestbredado, arbarkulturo kaj fiŝado. Tio estas konkludo de dek esploraj taĉmentoj konsistintaj el sciencistoj de topografio, klimato, botaniko, grundo, akvo-konservado, agronomio, arbarkulturo, fiŝado k. a., kiuj finis sian laboron antaŭ nelonge.



Sur la Stratoj de Ŝanhajo

Florvendejoj

SUR la stratoj de Ŝanhajo estas multaj florvendejoj.

La malvarma vento de frua printempo balaas la polvon sur la stratoj. Flavaj kalikantoj (*Calycanthus praecox*), blankaj narcisoj kaj verdaj orkidoj en la montrofenestroj interprete turnas siajn kapojn al la stratoj kvazaŭ ili volus konkure informi la preterpasantojn pri la alveno de la printempo. La florvendejoj funkcias kiel heroldoj de la printempo.

Kiam iu estas logata de la buntaj kaj bonodoraj floroj kaj ekhaltas antaŭ florvendejo, li ekpensos pri la tero, kiu ilin nutras, la tero kiu plej frue eksentas la alproksimiĝon de la printempo. La printempa tero en la Sudo de Jangzi-rivero fariĝas kreme humida dum marto kaj bonvenigas la piedpremon de laboremuloj, kiuj kreas la printempon kaj kreas riĉan rikolton de la jaro. Eble la ŝvebanta aromo eliĝas ĝuste el ilia koro?

Tiuj, kiuj plej frue eksentas la printempon en la antaŭurbo de Ŝanhajo kaj plej frue kontaktas kun la tero, informas samtempe pere de la florvendejoj la urbanojn pri la novaĵo de printempo. La sentoj de la urbanoj kaj kamparanoj intime interligiĝas.

Verdire, multaj butikoj en Ŝanhajo estas "florvendejoj". La montrofenestroj flor-similaj montras la prosperon de la socialisma urbo.

Venu! ni ĉiu akiru bukedon da printempo kaj kune kreu por ni printempon!

Mateno

Ŝanhajo vekiĝas apud Huangpu-rivero.

La fumbuboj en la antaŭurbo etendas sennombrajn longajn brakojn por dispeli la noktan atmosferon super la urbo kaj mansigni al la aŭroro.

La unua tramo ruliĝas el la tramejo, sur la glata asfalta vojo,

kvazaŭ la unua noto de simfonio. La konduktoro de malproksime mansignas al la veturantoj en longa vico kaj salutas:

"Bonan matenon, kamaradoj!"

"Bonan matenon!" Kiam la suno reliefe bildigas la altajn konstruaĵojn, ĉiu homo jam staras sur sia posteno. La preciza kaj kompleksa maŝino de la urbo komencas funkcii. La sango de la urbo cirkulas, kaj la pulso batas!

Ŝanhajo vekiĝas apud Huangpu-rivero.

Frumatene, mi vidas longan straton plenan de gimnazioj en helkolora vesto, sin banantaj en la matenaj sun-radioj. Ili ridas kaj interparolas en sia klara kaj milda dialekto. Mi aŭdas ke ili nur interparolas pri la bela estonteco. Verŝajne, dum ilia dormo en la lasta nokto nenia premsonĝo ilin ĝenis.

Sed ĉiu maljuna loĝanto de Ŝanhajo jam travivis en tiu ĉi granda urbo de la Oriento sennombrajn terurajn sonĝojn, dum kiuj ili kun la tuta korpo en malvarma ŝvito aŭdis la ĝemon de la



En la Florvendejo de Ĝang Ĵenhe, kiu jam ekzistis 300 jarojn.

Foto de He Ŝijaŭ

Mateno de la aŭtobusaj kaj tramaj haltejoj apud Huangpu-rivero.

Foto de Ĝeng Guanghua



malsatuloj loĝantaj en kabanoj, kaj vidis sub malhelaj strataj lampoj tiujn, kiuj estis ofendataj kaj turmentataj kaj la okazon ke antaŭ la pordo de drinkejo, de kie elradias forta lumo, usonaj maristaĉoj batis homojn per vinbotelo La fantomoj de la malnova mondo tiam ĉie impertinentis.

Nun, tiu ĉi densa nubaro de terura sonĝo subpremanta la urbon estas jam dispelita de la nove leviĝinta suno.

Ŝanhajo vekigis apud Huangpu-rivero.

La montrofenestroj fermitaj dum la nokto malfermas siajn okulojn al la strato. Sur la larĝaj stratoj en bona ordo, sennombraj vibrantaj punktoj el tramoj, aŭtomobiloj, piedirantoj kuniĝas en liniojn navede moviĝantajn, kiuj ankaŭ similas al streĉitaj kordoj el kiuj eliĝas forta muziko de la epoko. La sirenoj de la fabrikoj kaj vaporŝipoj akcelas la antaŭeniron de la vivo.


Sonoro

Jen la sonoro, kiel bone konata! La sonorilo de la doganejo tage kaj nokte elverŝas ondojn de ora sono.

Mi imagis ke Avo Tempo kun blanka barbo, loĝanta alte en la supra parto de la turo kaj fidela en sia tasko, peze kaj senlace sonorigas akurate kaj regule. Nun mi imagas ke tiu maljunulo, same kiel rakontite en fabelo, fariĝis ĉiam pli juna kaj jam kiel vigla junulo saltante kaj ĝoje kaj senlace sonorigas la horloĝegon regule.

La tempo forflugas. Tajdo en Huangpu-rivero altiĝas kaj malaltiĝas. "Tiel forkuras la pasanto tage kaj nokte senĉese".* Forkuris ja nur la ondoj malpuraj, nur la feĉo, rubo kaj malnovaj kutimoj. Jam tute forkuris la subpremaj kaj sangodoraj jaroj!

En iu frua mateno, silentiĝis la pafado sur la stratoj. La printempa pluvo malsekigis la pol-



La horloĝo-turo de la ŝanhaja doganejo en matena nebulo.

Foto de Vu Jinbo

von. La batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, kiuj okupis la urbon, por ne timigi kaj ne ĝeni la loĝantojn, ripozis sur la trotuaroj de la stratoj en sia pluvmantelo kaj fumis cigaredon. En la silento la sonorilo eksonoris: Tang, Tang, Tang! La oraj sonondoj disvastiĝis, ĉiu ŝanhaja loĝanto ĝojekscitite kaj elkore atendis kaj aŭskultis la sonoron, kiu anoncis la pereon de la malnova Ŝanhajo kaj la naskiĝon de la popola reĝimo kaj de la matenkrepusko de la nova jarcento. Sekvamomente, ekflirtis ruĝaj flagoj, svarme sonis tamburoj kaj tamtamoj, tondris ĝojkrioj.

La tempo grandpaŝe marŝas antaŭen. La sonorilo sonoris kune kun la batalkantoj kontraŭ la usona agreso kaj por helpo al Koreio, sonoris kune kun la krakfajraĵoj por la venko en socialisma reformo, sonoris kune kun la trumpeto de la Granda Antaŭensalto. . . .

La tempo grandpaŝe marŝas antaŭen. Nun estas alia mateno. Ni pli alten levas la tri ruĝajn flagojn de la Ĝenerala Linio de

Socialisma Konstruado, la Popola Komunumo kaj la Granda Antaŭensalto, ŝarĝite per pli granda respondeco ni marŝas antaŭen al nia difinita celo. Ni havas kuraĝon por turni la mondon.

La sonorilo anoncas: Nun estas la oka horo matene. Tio estas la voko fare de la tempo, voko ne al la sklavo, sed al la mastroj, al la estonteco. Jen la momento en kiu miloj kaj miloj da homoj samtempe rapidas al siaj postenoj por komenci siajn laborojn. Kaj kun la sonondoj torentas ferlikvoro en ŝtaluzino, greno en la kamparo, akvofaloj de ŝtofo, de ĵurnaloj.

Aŭskultu! Tang! Tang! Tang! . . .

Tio estas muziko de la tempo. Tio estas Junulo Tempo, kiu ludas sian marŝon. Tio estas kuraĝigo, instigo, averto: Kamaradoj, pro la socialisma afero, ŝatu la tempon kaj ne lasu ĝin pasi vane!

Kamaradoj, tempo! tempo! klopodu ke en ĉiu sekundo de la tempo ekbrilu io nova!

* Vorto de Konfucio.

Bonvena Pluvo



PLUVEROJ, delikataj kaj densaj, enŝteliĝas en nokton de frua printempo. Ili dolĉigas la sonĝon, kvietigas la koron, susure karesas la kampojn de la popola komunumo, kiuj akvon sopiras.

Frapante je la pordokurteno de la ĉambro ĉe la stalo, la pluvgutoj vekas la maljunan brediston, kaj li ĝojplene donas al la brutoj ankoraŭ pli da furaĝo. Frapante sur la tegmenton de la budo de la traktora stacio, ili vekas la

malpaciencajn junajn traktoristojn, kaj ĉi tiuj ekdisputas, al kiu produkta grupo ili devos unue konduki siajn ferajn bovojn morgaŭ matene. Ekaŭdinte ilian frapadon sur la malalta tegmentrando de la domo, la maljuna produkto-grupestro tiel ĝojiĝas, ke li eksidas en la lito kaj pipon fumas dum longa momento. Ekaŭdinte ilian frapadon ĉe la fenestroj de la komunuma oficejo, la sekretario de la Partia Komitato, kiu ĵus revenis de produkta grupo kaj lumigis la elektran

lampon, tuj deprenas la telefonan parolilon. . .

La pluveroj, delikataj kaj densaj, falas senĉese. . .

Ne, tio ne estas pluvo, sed tamburado por bonvenigi la printempon, por urĝi la plugadon. La pluvgutoj batas la gigantan tamburon de la tero, vibrigante la kordojn de la koroj de ĉiuj komunumanoj, en kiu tamburas la entuziasmo por laboro.

Jen komenciĝas la printempo, printempo bolanta kaj multpromesa!

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Bronza Brandvazo antaŭ 2000 Jaroj

Unu bronza rinocer-forma brandvazo antaŭ 2000 jaroj estas elfosita en Hingping-gubernio, Ŝenhi-provinco. La vazo pezas 13.3 kg. kun alto de 34.1 cm. kaj larĝo de 20.4 cm. (vidu la bildon)

La formo de la vazo estas staranta rinocero kun du kornoj. Ĝia kapo estas levita, la rigardo fiksita antaŭen, la oreloj starigitaj, kaj la vosto iom levita. Ŝajne ĝi estas alarmita de io kaj pretas por batalo. La tuta korpo estas inkrustita per oraj spiralaj desegnoj. Sur la dorso troviĝas rektangula aperturo kovrita de bronza kovrilo kun ringo.

Laŭ takso de arkeologoj ĝi estas produktajo en la tempo de la tria jarcento ĝis la unua jarcento a. K. Kaj uzita nur de iu imperiestro. Ĝi estas rara speco en formo kvankam la antikvaj bronzaĵoj ofte havis la formon de animaloj, sed nur tiujn de bovo, fenikso, gruo, elefanto, tigo, cervo k. a. Ĝia malkovro multe valoras por studo de ĉinaj bronzaĵoj kaj la historio de metiarto en antikva Ĉinio.

Blinda Aktoro

Teatra prezentado ŝajne estas neebila por blinduloj. Tamen unu ŝanhaja aktoro Ŝen Ĵang sukcesis persisti en sia teatra laboro post sia blindiĝo en 1954.

En aprilo ĉijare okazis lia kvina prezentado en la dramo "La Dua Printempo". Kaj lia prezentado ricevis vastan laŭdon.

En 1954 li suferis de malboniĝo de la vidpovo kaj de malsanoj de pulmo. Tiam oni lin sendis al la plej bona hospitalo por ĝui senpagajn medicinajn zorgojn. Kvar jarojn poste, lia pulmo tute resaniĝis, sed la blindiĝon de liaj okuloj oni ne povis kuraci. Tamen li persiste postulis revenon al la teatra laboro. Kaj helpate de la kolegoj, li povas nun ludi teatrajn rolojn kiel antaŭe, kaj

oni apenaŭ povas rimarki, ke li estas blindulo.


Krom la teatra prezentado li nun ankaŭ instruas dramludajn amatorojn kaj prelegas en iu drama lernejo.

Nova Rekordo de Naĝado

Nova tutlanda naĝa rekordo de tri minutoj kvardek ok sekundoj en kvarvira stafeto de centmetra liberstila naĝado estas starigita en aprilo de Fu Taĉin, Ŝa Liukang, Li Ŝiguang kaj Ĝou Tongven en Pekino.

Pli da Karbministoj Edziĝintaj

Laŭ statistiko 85% de la ministoj en Fuŝun-karbminejo en la Nordoriento de Ĉinio estas edziĝintaj, dum la proporcio antaŭ la Liberiĝo en 1949 estis nur 30%. Ĉar en la malnova Ĉinio, tre malmulte da knabinoj volis edziniĝi al la karbministoj, ne nur pro ilia malfacila vivo, sed ankaŭ pro la tro multaj danĝeroj minacantaj ilian vivon. Ekzemple gas-eksplozo estis tre ofta akcidento tiam en la karbominejoj, sed nun tiaj danĝeroj estas efektive eliminitaj.



Alia Dokumenta Filmo de Faktoj kaj Atestoj

— “Por Pace Solvi la Landliman Problemon inter Ĉinio kaj Hindio” —

LA landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio estas problemo al kiu ĉiuj homoj zorgantaj pri la mondopaco turnas sian atenton. La ĉina popolo ĉiam opinias, ke tiu ĉi problemo nepre devas kaj finfine povas esti solvita ĉe la tablo de intertraktado post racia argumentado kun solidaj pruvoj. Tial, la ĉina popolo ĉiam, eĉ dum la plej streĉa periodo de kolizio, restas sen ekscitiĝo kaj atendas la sobriĝon de la kontraŭa partio por komenci intertraktadon. Malgraŭ ke nun la Usono, Britio kaj kelkaj aliaj landoj jam sin miksis en la aferon, senĉese sendis personaron kaj materialojn al Hindio por ekipi kaj trejni la hindajn trupojn, kun intenco realigi la kriaĉon de Nehru “forigi la ĉinojn”, la publika opinio de Hindio ankaŭ ne kaŝas tiun ĝian intencon, la ĉina popolo, tamen, atendadas kun pacienco la konsenton de la Nehru-registaro pri intertraktado. Por ke ĉiuj pacamantoj de la mondo povu kompreni la veran situacion, teni sin por justeco, kaj alvoki Hindion al la tablo de intertraktado, la Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio eldonis jam la libron “La Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio”, ankaŭ nia gazeto publikigis en sia 2-a n-ro, 1963, la artikolon “Plena Ekspozicio de Vero”, kaj nun ni konigas al niaj legantoj la filmon “Por Pace Solvi la Landliman Problemon inter Ĉinio kaj Hindio”. Ĝi konsistas el la jenaj 4 partoj: 1) Inicito de Pafĉeso kaj Retiriĝo, 2) Bona Traktado al la Hindaj Militkaptitoj, 3) Liberigo de la Vunditaj kaj Malsanaj Militkaptitoj de la Hinda Armeo, 4) Redono de Militaj Ekipaĵoj al Hindio, kiuj

konsistas el vivaj bildoj de faktoj. Se la filmo “Vero pri la Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio” (Legu nian artikolon en N-ro 2 de EPĈ, p. 77) enhavas pli da dokumentoj, landkartoj kaj aliaj materialoj forte konvinkaj, klarigas la historiajn fonon kaj detalojn de la problemo, tiu ĉi dokumenta filmo spegulas la grandajn klopodojn, kiujn faris Ĉinio por pace solvi la landliman problemon inter Ĉinio kaj Hindio pere de granda nombro da vivaj faktoj kaj kortuŝaj scenoj.

“Inicito de Pafĉeso kaj Retiriĝo” klarigas la fundamentan sintenon de la Ĉina Registaro por paca solvo de la landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio, samtempe montras per kristalaj bildoj kiel la decido de la Ĉina Registaro estas lojale plenumita de la ĉinaj landlimaj gvardioj, kiuj retiris sin de sur la tuta linio de la ĉini-hindia limo efektive kontrolata en 1959, post la inicito de pafĉeso ĉina-flanka. Kiam la Ĉina Registaro deklaris iniciate la pafĉeson kaj retiriĝon,

la hindaj aŭtoritatoj inkluzive de multaj altrangaj oficistoj, disvastigis opiniojn de dubo. La hindia ministro por eksterlandaj aferoj kaj por nacia defendo, sinjorino Menon diris: “Kiel povas retiri sin la armeo kiu estas antaŭen marŝanta? Neniam en la historio okazis tia afero”. Ankaŭ la hindia ministro de justico Sen rigardis la gravajn paŝojn alprenitajn de Ĉinio kiel “alian miton”. Jes, tio vere estas afero neniam okazinta en la historio, kaj vere estas “mito” por tiuj homoj, kiuj rigardas agreson de alies teritorio kiel aferon tute naturan. Sed kiel la fakto pruvis, la “mito” jam fariĝis realo.

Tiu ĉi parto krome vive montras scenojn, en kiuj la ĉinaj landlimaj gvardioj kunvivas kun la lokaj popolanoj kiel fiŝo kaj akvo, kunlaboras kiel membroj de unu familio dum sia restado en la regiono sude de la kontraŭleĝa McMahan-linio. La tieaj vidaĵoj kaj kulturaj objektoj prezentitaj en la filmo konvinke pruvas, ke

La ĉina landlima gvardio de la mont-pasejo “Aĝla Nesto” sin retiras al regionoj norde de Tangapani-rivero. Foto de Li Kilu



tiu regiono estas jam de longa pasinteco parto de la ĉina teritorio. Ni vidas ke multe da temploj, konstruoj, popolaj kostumoj, moroj, vivmanieroj, religiaj kredoj kun karakteraj trajtoj kaj ankaŭ la prezentado de la tibetaj teatraĵoj, kantoj kaj dancoj ktp.

ĉiuj estas samaj kiel aŭ tre similaj al tiuj de la tibeta nacio de Ĉinio.

En la partoj "Bona Traktado al la Hindaj Militkaptitoj" kaj "Liberigo de la Vunditaj kaj Malsanaj Militkaptitoj de la Hinda Armeo", oni fidele fotis la

vivon de la hindaj armeanoj kaptitaj en ilia atakado kontraŭ la ĉinaj landlimaj gvardioj kaj vivantaj en la domoj de militkaptitoj. La filmo registris ankaŭ scenojn kiam hindajn vunditajn kaj malsanajn militkaptitojn Ĉinio liberigas iniciate el konsidero de la amikeco inter Ĉinio kaj Hindio, kaj donas ĝeneralan bildon pri la vera vivstato de la hindaj militkaptitoj. Oni klare vidas en tiuj partoj, ke tiuj personoj, de la estro de la 7-a brigado ĝis ordinarej soldatoj de Hindio, ĉiuj estas bone traktataj kaj prizorgataj de la ĉinoj. La hindaj kaptitoj ricevis ĉion, kio estas necesa por ilia ĉiutaga vivo, inkluzive de la vatitaj vestoj, litkovriloj, turbanoj kaj raziloj. Kvankam la altaj krutaj montoj malfaciligas liveron de la necesajoj, tamen oni faras ĉion eblan por kontentigi ilian bezonon. Multaj hindaj soldatoj ne havis sufiĉe varmajn vestojn, kiam ili estis kaptitaj, tuj poste ili surhavis novajn vatitajn vestojn kaj kaskedojn. Jen, elkora rideto ekbrilas sur ilia vizaĝo! Kaj tiuj ridantaj vizaĝoj sur la pilkoludejo, la gaja sceno de dancoj kaj kantoj en la semajnfina vesper-kunveno montras tiom da plezuro kaj senzorgeco en iliaj koroj. Same kiel en iliaj propraj hejmoj, ilia religia kredo, nacia sento kaj vivkutimo estas plene respektataj kaj prizorgataj. Ĉio ĉi estas esprimo de plena respektado al ilia personeco.

La sceno pri liberigo de la vunditaj kaj malsanaj kaptitoj estas plej emocia. Ĉiu el ili ne volas tuj forlasi kaj sentas bedaŭron ĉe la disiĝo, foje refoje ili prebrakumas la ĉinajn laborantojn de kuracado kaj flegado, reciprokas adiaŭojn, bondezirojn kaj petadas por subskriboj kaj kunfotografado por memoro pri la amikeco. Ĉu ili povas deteni sin de emociiĝo, kiam ili rememoras pri la kunvivado dum pli ol unu monato aŭ eĉ nur kelkaj semajnoj pri la zorgema kuracado, flegado, kuler-post-kulera nutrado, kiam

Je la 12-a de dec., 1962, kiam la ĉina landlima gvardio sin retiras el Dijang Dzong, ĝin adiaŭis Monba-naciaj popolanoj.

Foto de Li Kilu



La militaj ekipaĵoj redonitaj de la ĉina flanko al la hinda flanko en Valong.

Foto de Hju Bihua



ili vidas, ke ili mem aŭ iliaj kunuloj estas subtenataj aŭ surdorse portataj en la aŭtomobilojn ĉe la disiĝo?

Multaj homoj longe preme tenas la manojn de la ĉinaj medicinaj laborantoj — nefindireblaj estas iliaj vortoj. “Baji! Baji!” (Frato!) sonadas por esprimi abundon de amikaj sentoj! Kiam vi vidas, ke larmoj ŝvelas en la okuloj, fluas sur la vizaĝoj kun eksciiĝo, eble ankaŭ vi deteni vin de larmado jam ne povas.

Tio ĉi memorigas nin pri la situacio, en kiu troviĝas la ĉinaj elmigrintoj arestitaj kontraŭleĝe de la Hinda Registaro kaj revenigitaj en sian patrion de Ĉinio per ŝipo antaŭ nelonge. La Hinda Registaro amase arestis ilin en nov., 1962, post kiam Ĉinio deklaris iniciate pafĉeson, pretekstante, ke ili krimas pro “minaco al la sekuro de Hindio.” El la pli ol 2,000 malliberigitaj ĉinoj estas 600 infanoj, 800 virinoj (inkluzive de multaj gravedaj) kaj granda nombro da gemaljunuloj de pli ol 60 jaroj. Ĉiuj ili suferis nesufiĉon de nutraĵo, mankon de higienaj kondiĉoj, iliaj posedaĵoj estis forrabitaj, pluraj el ili estis eĉ forte batitaj. El komparo de la du manieroj supre menciitaj justaj homoj povas mem eltiri sian ĝustan konkludon.

La filmparto “Redono de Militaj Ekipaĵoj al Hindio” dokumentis scenojn, en kiuj la ĉinaj landlimaj gvardioj redonas al Hindio en tempo de sia retiriĝo la grandan nombron da militaj ekipaĵoj de armiloj, kugloj, obusoj, ktp. kiujn ili akiris dum batalo kontraŭ la atako de Hindio. Koncerne tion, la hindia flanko havis intencon misprezenti la aferon dirante, ke la ekipaĵoj redonitaj al Hindio jam “serioze difektiĝis” aŭ eĉ “neripareblas”. Sed kion diras la fakto? Oni vidas en la filmo, ke ĉiuj redonaĵoj estas purigitaj, tiel estas la kanonoj, aŭtoj en vicoj, kiel la amasoj da ĉiuspecaj pafiloj.

Komparante ilin kun la malnova ruina aspekto, kiun ili havis kiam ili estis postlasitaj de la hinda armeo, oni povas nur ricevi tute malsaman impreson en klara kontrasto. Tiuj faktoj forte refutas la misprezentojn de la kalumniantoj.

Tiaj agadoj, kiaj iniciate ĉesigi pafadon, retiri armeon, liberigi la kaptitajn vunditojn kaj malsanulojn, redoni la militajn ekipaĵojn,

ĉiuj estas grandanimaj faroj senprecedencaj en la historio. Nur la ĉina popolo vere amanta pacon, deziranta pacan solvon de la landlima problemo inter Ĉinio kaj Hindio povas tion fari. La faktoj tiel vivecaj, kiel vidigitaj en la filmo, neniel povas esti makulitaj aŭ kovritaj per mensogoj, kalumnioj kaj almeto de la etiketoj “MILITEMA”, “AGRESIVA” k.a. al Ĉinio.

La militaj ekipaĵoj redonitaj de la ĉina flanko al la hinda flanko en Diĵang Dzong.

Foto de Li Kilu



La hindaj militkaptitoj tuj liberigitaj norde de Bang-montpasejo adiaŭas la ĉinajn laborantojn de la militkaptitejo.

Foto de Ma Gingkiu



HONFAN:

VEJĈIO

— La plej longhistoria ĉina tradicia ŝakludo —

En la rubriko "Ĉina Ŝako" en lasta jaro sur nia gazeto ni aperigis serion da artikoloj pri unu speco de ĉina ŝako kutime nomata Ŝiangĉi (t. e. elefanto-ŝako). Nun ni volas konĝi al nia legantaro ekde tiu ĉi numero alian pli interesan kaj pli longhistorian ĉinan tradician ŝakludon Vejĉio. Ni esperas, ke la nova serio same interesos nian legantaron.

I. Fundamentaj Scioj de Vejĉio

1. Vejĉio en Ĉinio

Vejĉio estas tradicia ŝakludo tre ŝatata en Ĉinio jam de la antikveco. Laŭlegende ĝin kreis la reĝo Jaŭ ĉirkaŭ la 23-a jarcento antaŭ nia erao por disvolvi la inteligentecon de sia filo. Aŭtentikaj literaturaj verkoj pri vejĉio troviĝis en la klasikaj verkoj de Konfucio (551-479 a. K.) kaj Mengzi (372-289 a. K.). Evidente antaŭ la kvina jarcento a. K. ĝi estis jam sufiĉe vaste konata kaj ŝatata de la ĉina popolo.

Specialan libron pri arto de vejĉio oni verkis jam en la dua jarcento. Ankaŭ en multaj literaturaj verkoj ĝi estis menciita. Ĉirkaŭ la sesa jarcento ĝi estis enkondukita en Japanion, kaj tie ĝi ricevis popularigon laŭ la nomo "go".

Verŝajne, vejĉio estis necesa arto por kleruloj kaj talentuloj en antikva Ĉinio. Ĝi estis ofte menciita kune kun skribarto, pentrarto kaj ludo de ĉina citro. Ankaŭ en la kortegoj troviĝis vejĉio-oficistoj. Sed nun ĝi jam fariĝis popola ludo. En 1962 fondiĝis la Ligo de Ĉinaj Vejĉiistoj, kies

honora prezidanto estas vic-ĉefministro Ĉen Ji, kaj eldoniĝis Vejĉigazeto. Vejĉi-konkursoj ofte okazas. Japanaj kaj ĉinaj vejĉiistoj jam plurfoje interviziitis por lerni la vejĉi-arton unuj de la aliaj kaj ĝin altigi. Do vejĉiludo servas nun jam ne nur kiel amuzilo por la ĉina popolo, sed ankaŭ kiel ligilo por amikeco inter popoloj.


2. Instrumentoj de Vejĉio

La intereso de vejĉio kuŝas en tio, ke ĝi estas simpla kaj samtempe tre varia. La simplecon oni tuj povas senti vidante ĝiajn

Diagramo 1 →

Sceno el la Unua Tutlanda Vejĉiokonkurso de la Ĉinaj Geknaboj.

Foto de He Ŝijaŭ



ŝaktabulon kaj ŝakpecojn multe pli simplajn ol tiuj de aliaj ŝakludoj.

La **vejĉi-tabulo** estas kvadrata el ligno, kartono aŭ papero. La grandeco estas proksimume 40 × 40 cm. Sur ĝi estas desegnitaj nur 19 horizontalaj kaj 19 vertikalaj linioj (diagramo 1), kiu formas 361 kruciĝajn punktojn (inkluzive la konverĝajn punktojn de la linioj ĉe la anguloj kaj la limo-linioj).

Ŝtono estas la nomo de la ŝakpecoj de vejĉio, ĉar antaŭe ili estis kutime faritaj el ŝtono. Ili estas disketoj, kies malsupra flanko estas plata, kaj la supra, konvekso, kun diametro de ĉirkaŭ 1.5 cm. Sur ili troviĝas nenia desegno aŭ figuro. La ŝtonoj sin distingas per du koloroj. Unuj estas blankaj kaj la aliaj, nigraj. La nombro de la blankaj ŝtonoj estas 180, kaj tiu de la nigraj estas 181. Fakte en la ludo, oni neniam uzas tiom multe da ŝtonoj.

3. Primaraj Reguloj de Vejĉio

Ludantoj — Vejĉio estas ludata de du personoj. Unu uzas la blankajn ŝtonojn, kaj la alia, la nigrajn. La nigra flanko ekludas la unua.

Ludo — Kontraŭe al aliaj ŝakludoj, antaŭ la ekludo neniuj ŝakpecoj devas troviĝi sur la vejĉi-tabulo. La nigra flanko komencas la ludon per meto de unu nigra ŝtono sur iun kruciĝan punkton (ne en la kvadraton) sur la tabulo, kaj tion sekvas la blanka flanko. Tiel alterne ili metas ŝtonojn ĝis la fino de la ludo. Ĉiufoje oni povas meti nur unu ŝtonon, kaj la metitan ŝtonon oni ne povas movi.

Venko — Kiu flanko sukcesis okupi ĉe la fino pli grandan teritorion t. e. pli multajn punktojn sur la vejĉi-tabulo, tiu gajnas la ludon.


4. Ĉirkaŭatako kaj Forkapto

Leginte la supre diritajn regulojn oni povas miri, ĉar se la


du flankoj metas siajn ŝtonojn alterne, kiel povas esti ke unu flanko okupos pli grandan teritorion ol la alia. Ni klarigu unue unu el la faktoroj de la sekreto.

Vejĉio en ĉina ideografiaĵo signifas "ŝakludo de ĉirkaŭatako aŭ sieĝo". Ĉar la metitaj ŝtonoj rolas kiel soldatoj. Ili ne nur okupas sian pozicion sur la batal-kampo, sed ankaŭ atakas ŝtonojn de la kontraŭa flanko. Kiam iu(j) ŝtono(j) de unu flanko estas ĉiuflanke ĉirkaŭita(j) de malamikaj ŝtonoj, kaj troviĝas neniuj libera, t. e. vakanta punkto inter ili, tiu(j) ŝtono(j) estas tuj forkaptita(j) de sur la vejĉi-tabulo, kaj la punkto(j), kiu(j)n okupis la forkaptita(j) ŝtono(j), estas rigardata(j) konkerita(j) de la kontraŭa flanko (diagramoj 2-7). En dia-


Diagramo 2





Diagramo 3




Diagramo 4



Diagramo 5



Diagramo 6




Diagramo 7


gramo 2, la nigra ŝtono estas ĉiuflanke ĉirkaŭata, sekve ĝi estas forkaptita en diagramo 3 de la blanka flanko. Similaj estas la kazoj en diagramoj 4 kaj 5, 6 kaj 7, kvankam la nombro de la ĉirkaŭataj ŝtonoj ne estas samaj.

La 4 limlinioj de vejĉi-tabulo estas rigardataj kiel komunaj defendaj linioj. Ili do povas esti utiligataj de ĉiu flanko, kiu kaptas ŝtono(j)n de la kontraŭa flanko. Tial ĉe la angulo oni povas kapti kontraŭflankan ŝtonon per nur du ŝtonoj (diagramo 8), kaj ĉe la limo, per tri ŝtonoj (diagramo 9).

Diagramo 8



Diagramo 9



Oni povas vidi, ke ne ĉiuj ŝtonoj metitaj sur la vejĉi-tabulo povas vivi daŭre kaj firme okupi sian pozicion. Por defendi la vivon de la metitaj ŝtonoj kaj garantii okupi pli grandan teritorion, disvolviĝis la tuta arto de vejĉio. Tion ni parolos en la sekvantaj ĉapitroj.

La Pekina Anaso

La pekina anaso havas mondfamon. Ĝi originis de la okcidenta antaŭurbo de Pekino, inter la Somera Palaco kaj Jukjuan-monto. Tie la riveroj, devenantaj el montfontoj, fluas malrapide kaj neniam glaciĝas. Tiuj riveroj, mallarĝaj, kun akvo malprofunda kaj riĉa je herboj kaj salikokoj, estas bona vivmedio de la pekina anaso. Krom la riveroj originantaj de Jukjuan-monto, ankaŭ tiuj de Lianhualago kaj Tangŝan-monto estas taŭgaj lokoj por ĝia bredado.

La anasidoj, kun plumoj flavaj, estas ĝenerale nomataj “anasflavoj”. Plenkreskinte, ili fariĝas neĝblankaj, kaj nomiĝas “blankaj anasoj”. La pekina anaso estas karakterizata precipe per la nutromaniero, nome ŝtopado de ĝia kropo per nutraĵo. Pro tio ĝi ankaŭ estas vulgare nomata, “ŝtop-anaso”. Kiam komenciĝis la bredado de tia anaso? Oni ankoraŭ ne scias precize. En la libro *Gravaj Rimedoj por*


Feliĉigi la Popolon verkita de Gia Sihie antaŭ 15 jarcentoj, jam estas menciita la kropoŝtopa nutrado. Laŭ la ekzistado de la du famaj pekinaj restoracioj de rostitaj anasoj Bianjifang (fondita en 1855 p. K.) kaj Kjuangjude (fondita en 1864 p. K.), oni povas diri sen troigo, ke la pekina anaso havas historion almenaŭ de pli ol cent jaroj.

Unu pekina anaso povas pezi 3-4 kilogramojn. De ĝia eloviĝo ĝis buĉiĝo necesas malpli ol tri monatoj. La kropoŝtopa nutrado estas praktikata nur en la lastaj 10-20 tagoj, sed en tiu mallonga tempo ĝia pezo povas pligrandiĝi je ĉirkaŭ 2 kilogramoj. La kropoŝtopa nutrado ne nur povas rapide kaj grandkvante plimultiĝi la grason, sed ankaŭ — kaj tio estas pli grava — plibonigas la kvaliton de la karno per la akumulado de graso. Inter buĉitaj grasa anaso alimaniere nutrita kaj “ŝtop-anaso”, oni trovas la jenan diferencon: en la unua es-

tas relative malmulte da graso inter la karnaj fibroj, dum en la dua la graso abundas kaj la ruĝa karno estas dividita de tavoloj da blanka graso (la spertuloj ĝin nomas “ruĝa-blanka viando”). Post la rosto la komparo fariĝas eĉ pli interesa: la haŭto de ordinara anaso kaviĝas kaj apenaŭ restas graso en la viando, kiu pruviĝas malmola kaj maldelikata; la haŭto de “ŝtop-anaso” estas pulpa kaj ŝvelmola, kaj la viando pli penetrita de la graso pro la rosto, fariĝas kraketa kaj mola, delikata kaj bongusta, kiel oni diras: “graso riĉa, sed naŭzeton ne kaŭzas; viando dika, sed dentfendojn ne ŝtopas”.

En 1873, usonano James kaj anglo Ker (laŭprononce) kunportis ovojn de la pekina anaso al siaj respektivaj landoj. La anasoj de tiuj ovoj devenintaj estis tiom aĉetataj, ke ili ne sufiĉis por kovri la mendojn kaj ilia prezo multoble plialtiĝis. En la usona merkato aperis la diro, ke “la pekina anaso estas ora briko”. Anglaj komercistoj venis al Tiangin kaj starigis tie organizon, kiu sin dediĉis ekskluzive al la aĉeto de pekinaj anasoj por ilin vendi en Anglio kaj gajnis per tio eksterordinarajn profitojn.

Nun la pekina anaso ne nur estas bredata en la tuta Ĉinio de Hejlongkiang-provinco en la nordo ĝis Guangdong-provinco en la sudo, de Hinkiang en la okcidento ĝis Giangsu kaj Ĝegiang-provincoj en la oriento; sed eĉ lasis siajn piedsignojn en multaj socialismaj landoj, en Japanio, k.a.. Ĝia vojaĝo tra la mondo montras, ke ĝi estas bona anaspeco, kiu povas akomodiĝi al malsamaj kondiĉoj. Post la Liberiĝo de Ĉinio, ĝia bredado ege disvastiĝis en pekina regiono, kiu havas nun cent kelkdek oblojn pli da pekinaj anasoj ol antaŭ la Liberiĝo, kaj ankaŭ la bredmetodo multe pliboniĝis.




ĈINAJ POŝTMARKOJ

La 98-a serio de p.m. emisiita (5-V-1963) de la Ĉina Poŝto por memori la 145-an naskiĝan datrevenon de K. Marks.

Portreto de K. Marks
326-1 8c.

La kovrilo de la unua eldono de la libro "Komunista Manifesto" kun la ora surskribo "Proletoj de ĉiuj landoj, unu-ĝu!" 327-2 8c.

K. Marks kaj F. Engels. 328-3 8c.



Du Steloj

Je du steloj mi esperas
Unu ruĝa, unu verda
Kaj al ili mi marŝadas
Sed la vojo estas longa!

Tiom longa ke ĉi okuloj
Kelkafoje tre laciĝas!
Tiam ŝajnas ke ĉi steloj
Pli for de mi, ili iĝas!

Mi eksidas sur vojrandon,
Kaj en miaj fortaj manoj
Premas mian povran kapon!
Kaj revas pri miaj steloj.

Ilin vidas mi en revo
Pli brilaj ol antaŭe
Kaj sub bela ĉielarko
Radias al mi denove.

O "Stelano" iri, marŝu!
Jam ni brilas kaj pli brilos
Ĉiam al ni kredu, kredu!
Iam mondon ni prilumos.

Decideme mi ekstaras
Kaj reiras sur longvojo;
Laŭvoje mi alvokas
Hezitatojn al hom-celo.

Karlo Gautier, Francio

Nobla Senpartieco

Reĝo Pinggong de Ĝin-regno demandis al sia kortegano Ki Huangjang:

"Nun mankas al Nanjang guberniestro. Diru, kiu taŭgas por tiu posteno?"

Senhezite Ki respondis:

"Estas plej bone asigni tiun postenon al Hie Hu. Li certe estas kompetenta por ĝi."

"Ĉu Hie Hu ne estas via malamiko?" mire demandis Pinggong. "Kial vi rekomendas lin?"

"Vi demandis min nur, kiu estas kompetenta kaj kiu estas la plej taŭga por tiu posteno. Vi ja ne demandis, ĉu Hie Hu estas mia malamiko!"

Pinggong do sendis Hie Hu al Nanjang por posteniĝi. Kaj tiu ĉi, enoficiĝinte, faris multan bonon al la tieaj popolanoj kaj pro tio estis multe laŭdata de ili ĉiuj.

Post iom da tempo, Pinggong denove demandis al Ki Huangjang:

"Nun al nia kortego mankas juĝisto. Diru, kiu kapablas okupi la postenon?"

"Ki Vu taŭgas por ĝi," Ki respondis.

La reĝo ree ekmiris kaj demandis:

"Ĉu Ki Vu ne estas via filo?"

"Vi demandis min nur, kiu estas kompetenta," Ki respondis, "tial mi lin rekomendis. Vi ja ne demandis, ĉu Ki Vu estas mia filo!"

Pinggong do asignis la postenon al Ki Vu. Kiel juĝisto ankaŭ tiu ĉi faris multan bonon al la popolo kaj estis tre ŝatata.

Aŭdinte tiujn okazintaĵojn, Konfucio multe laŭdis Ki Huangjang-on. Li diris:

"Kiel bone li diris! Li rekomendis personon nur laŭ ties kapablo kaj virteco: kvankam Hie Hu estis lia malamiko, tamen li rekomendis lin senpartie; kvankam Ki Vu estis lia filo, tamen li rekomendis lin, ne timante klaĉojn de aliuloj. Tia homo, kia Ki Huangjang, vere havas la virton de nobla senpartieco!"

SEP MUSO-FRATOJ

Antaŭ multe da jaroj vivis sep muso-fratoj. Ili posedis terpecon je vasteco de manplato. Estis vintro. Foje neĝo falis kaj kovris ilian teron. En la sekvinta mateno, la sep musoj forŝovelis la neĝon kaj trovis peceton da butero. La plej juna frato estis komisiita por ĝin gardi. Kiel bonodora la butero estis! De tempo al tempo la frateto ĝin lekis kaj lekis, kaj fine forkonsumis ĝin. Tion eksciinte, la ses fratoj ege koleriĝis, kaj donis al li fortajn batojn. Poste ili ankoraŭ ne povis kvietiĝi kaj kverele iris kun la frateto al Ĥano Malsata Kato por peti ties juĝon.

Al Ĥano Malsata Kato la muso-fratoj diris:

“Ni estas sep fratoj.”

“Ha, vere granda familio!” diris Ĥano Malsata Kato.

“Ni havas pecon da tero tiel vastan kiel manplato.”

“Ho, kiel vasta loko!”

“Falis bovlo da neĝo.”

“Ve, tio preskaŭ kaŭzis katastrofon!”

“Frumatene vekiĝinte ni forŝovelis la neĝon.”

“Vidu, kiel diligentaj!”

“Ni trovis peceton da butero.”

“Bonŝance, vi preskaŭ fariĝis riĉuloj!”

“Ni ĝin donis al la plej juna frateto por ĝin gardi.”

“Ho, kompetenta gardisteto!”

“Li lekis kaj lekis, kaj fine ĝin forkonsumis.”

“Kia manĝemulo, tute simila al malsatulaĉo!”

“Ni donis al li batojn kaj batojn.”

“Hm, vi ekzekutistoj!”

Ĥano Malsata Kato jam de longe volis ilin formanĝi. Tion dirinte, ĝi utiligis la oportunon, kiam la musoj ne atentis, por subite sin ĵeti al ili. Unu estis kaptita, kaj la ceteraj forkuris.



Malveraj Opinioj disbatitaj

Abonanto al “El Popola Ĉinio” ekde 1958, mi deziras diri al vi, kiom mi ŝatas vian artan revuon. Mi tre ĝuas ĝiajn belajn ilustraĵojn. Ĝiaj artikoloj estas ĉiam tre interesaj, kaj bone informas nin pri la vivo en via bela lando.

Unu el miaj filinoj estas profesoro pri geografio en privata, katolika lernejo (neŝtata, sed aprobita de la ŝtato). Ŝi uzis plurajn fojojn vian revuon por sia instruado. Bedaŭrinde, oni tre malbone konas Ĉinion en nia lando. Pro tiu nescio, ekzistas ankoraŭ multaj antaŭjuĝoj. Mi

ja trovis personon, kiu ankoraŭ imagas la ĉinojn kiel strangajn homojn, kun haŭto citronkolora, kaj longa harplektaĵo pendanta de la verto! Montrante vian revuon, mia filino povis facile disbati multe da malveraj opinioj pri Ĉinio, kaj doni al siaj lernantinoj interesajn kaj ĝustajn informojn pri via popolo.

E. Motillon, Francio

Por interkompreno kaj amikeco

Via gazeto servas por interkompreno kaj amikeco inter nacioj kaj daŭrigas la disvolvon de internacia Esp. kulturo. Anoncoj pri korespondo presataj en ĝi bone helpas konatiĝi kun alilandanoj kaj tiamaniere firmigi amikajn kunligojn inter popoloj de la mondo.

El via gazeto ni ĉerpas interresajn informojn pri kultura vivo kaj socialisma konstruado en via potenca, laborpova regno. Mi kun granda intereso kaj plezuro legis artikolojn pri reformo de la ĉina skribado, ĉar ĉi tiu afero havas gravan signifon por kultura kaj ekonomia disvolvo de Popola Respubliko de Ĉinio.






Sibircev V. A., Sovetunio

Rezulto de Konkurso

Ni ĝoje sciiĝas, spite de malfruiĝo, ke la konkurso organizita de s-ano Gersi Alfredo Bays, Caixa Postal 49, Xapeco, Santa Calarina, Brazilo (anoncita en EPĈ n-ro 5, 1962) rikoltis grandan sukceson. La jenaj premiitoj gajnis abonojn al EPĈ por la kuranta jaro:

1. V. Bajgarov, 5-ja Pobelos 22, Kursenai, Litovio, Sovetio.
2. J. Jarnurskiewicz, Pasowiecka 69, Krakow, Pollando.
3. J. Vesterland A, Boks 136, Kobenhavn K, Danlando.
4. C. Balacz, Rottenbiller u. 29/a. II. 16, Budapest VII, Hungario.
5. M. Cooke, 75 Cobden Str., Waterhead, Oldham, Lanes, Anglio.

Ni esprimas niajn korajn gratulojn kaj dankojn al s-ano Gersi Alfredo Bays pro lia kontribuo al la klopodo por amikeco kaj interkompreniĝo per Esperanto, kaj ni ankaŭ deziras al li pluajn sukcesojn. Al la supre-menciitaj esperantistoj ni regule sendas nian revuon dum la jaro 1963. Ili estas petataj sciigi nin okaze de ne-ricevo.



LIBROJ PRI INERNACIA KOMUNISMA MOVADO

Ĉefartikoloj el "Renmin Ribao" kaj "Ruĝa Flago"
(en diversaj lingvoj)

Proletoj de Ĉiuj Landoj Unuigu por Oponi Nian Komunan Malamikon (32p. R.0.09, £.0-0-9)

La Malakordoj inter K-do Togliatti kaj Ni (43p. R.0.13, £.0-1-0)

Leninismo kaj Moderna Reviziismo (20p. R.0.06, £.0-0-6)

(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, germana, rusa, japana, vjetnama, araba kaj taja)

Proletoj de Ĉiuj Landoj Unuigu por Oponi Nian Komunan Malamikon

(pliampleksigita eldono)
(88p. R.0.19, £.0-1-6)

Ni Unuigu sur la Bazo de la Moskva Deklaracio kaj Moskva Deklaro (40p. R.0.09, £.0-0-9)

De Kie Venis la Malakordoj? (40p. R.0.09, £.0-0-9)

— Respondo al k-do Thorez kaj aliaj
(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, germana, rusa, japana, vjetnama, araba, taja kaj hindia)

Refoje pri la Malakordoj inter K-do Togliatti kaj Ni

— Pri kelkaj gravaj problemoj de leninismo en la nuna tempo (196p. R. 0.35, £0-2-9)





Komentario pri la Deklaro de la Komunista Partio de Usono (20p. R. 0.06, £.0-0-6)

Spegulo por Reviziistoj (16p. R. 0.06, £.0-0-6)
(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana, germana, rusa, japana, vjetnama, araba, taja, hindia kaj itala)

Eldonis

FREMDLINGVA ELDONEJO

Aĉeteblaj ĉe: **Guozi Shudian**, Poŝtkesto 399,
Pekino, Ĉinio



Opinio de kuracisto

Pri la enhavo de la revuo "El Popola Ĉinio", kiel aliffoje mi havis okazon esprimi mian opinion, mi denove ripetos ĝin: nin la fremdlandulojn plej multe interesas viaj sciencaj atingajoj

en diversaj branĉoj de la scienco, la atingajoj en la konstruado de socialismo en via lando. Duan lokon okupas la aliaj aferoj en via vivo. Mi kiel kuracisto ekzemple interesiĝas pri medicinaj kaj biologiaj aferoj. Mi tre ĝojas kiam en E.P.Ĉ. aperas artikolo

aŭ sciigo pri tio pli ofte. Malgraŭ ke la revuo ne estas scienca revuo, en ĉiu numero oni aperigu pli ofte diversspecajn artikolojn kaj sciigojn el la diversspecaj branĉoj de la scienco kaj la tekniko.

T. Todorov Bulgario

LIBROSERVO DE Ĉ.E.L.

La Libroservo de Ĉ.E.L. celas havigi al esperantistoj kaj Esperantaj organizoj rapide kaj facile Esperantaj eldonadojn de Ĉinio. Ĝiaj ĉefaj servoj estas:

* eksporti ĉinajn Esperantaj eldonadojn, nome: akcepti abonojn al *El Popola Ĉinio* kaj mendojn al eldonadoj de Ĉ.E.L. kaj la Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio, kaj zorgi pri la distribuaj aferoj, inkluzive la korespondadon kun la perantoj, abonantoj (mendantoj) kaj specimenterantoj ktp.

* importi Esperantaj librojn interesanĝe

* liveri senpagan provspecimenon de la Esperanta revuo *El Popola Ĉinio* al la petantoj kaj specimenojn de ĉinaj Esperantaj libroj por varbado kaj utiligo

* liveri senpage katalogon, prospekton kaj aliajn presadojn de Esperantaj eldonadoj de Ĉinio

Favora rabato por niaj perantoj estas garantiata. Ankaŭ la pogranda mendantoj ĝuas tian favoran rabaton. Oni ankaŭ povas unue mendi kaj pagi poste aŭ mendi kredite, aŭ laŭ aparta interkonsento pagi per siaj libroj.

Ni estas ĉiam pretaj servi al niaj perantoj, abonantoj, mendantoj kaj legantoj. Se vi deziras ion el Ĉinio en Esperanto, bonvolu vin turni al niaj perantoj aŭ rekte al ni.

**LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. KESTO 313, PEKINO, ĈINIO**

Sofia — la Urbo de la 48-a U.K.

Kiel jam estas konate, dum la kuranta jaro de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, en la ĉefurbo de Bulgario — Sofia okazos la 48-a Universala Kongreso.

Ĉar por la unua fojo en Bulgario okazos UK, ne superflue estus ŝajne, se oni komunikus kelkajn faktojn pri tiu kongresurbo.

La Sporta Halo de Sofia, kie okazos la inaŭguro de la 48-a Universala Esperanto-Kongreso.

En la mezo de la Sofia kampo, longa 75 kaj larĝa preskaŭ 16 km., 550 m. super la marnivelo, je 23°19' longitudo laŭ Greenwich kaj 42°41' geogr. latitudo kuŝas la ĉefurbo de Bulgario — Sofia.


Ĉirkaŭbarita de la montoj Vitoŝa, Stara Planina (Balkano) kaj Ljulin, kun modera klimato,

Sofia, laŭ la opinioj de kompetentuloj, ĝuas la famon de la multaj ĉefurboj en la mondo, kies situo ravas la vizitantojn.

Fondita jam antaŭ pli ol du mil jaroj kaj ŝanĝinte sian nomon de Ulpia Serdika, kiun ĝi ricevis de la romia imperiestro Marc Ulpij Trajan, je Ŝredec, donita de la slavo en 811, fine dum la regado de caro Ivan Ŝiŝman, en la XIV-a jarcento la urbo ricevis sian nunan nomon Sofia, travivinte plurajn reformojn kaj eventojn.

Paralele kun tiuj ŝanĝoj kaj eventoj, kiujn la urbo spertis dum multaj jarcentoj, variis respektive ankaŭ la nombro de ties loĝantaro. De 12 000 personoj, kiom ĝi havis en 1878 dum nia liberiĝo el la turka jugo, nun Sofia havas pli ol okcent mil loĝantojn kaj oni vicigas ĝin inter la modernaj kaj kulturaj urboj en la mondo.

Pluraj monumentoj kaj elfositaj ruinaĵoj en la limo de la nuna urbo, precipe el la romia epoko, indikas pri ties varia historia situacio.



Esperanto Marŝas

EL MOSKVO, SOVETUNIO

HONORE AL MERITOJ DE S. V. SARIĈEV — La Esperanta Sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj aranĝis je la 2-a de lasta dec. memorvesperon dediĉitan al funebra memoro de nia forpasinta veterana esperantisto S. V. Sariĉev (1890-1960). Pri lia vivo honesta kaj sindonema al Esperanta agado bone parolis D-ro K. Lavrentjev. Interalie li diris, ke la vivo de S. V. Sariĉev estas imitinda por ĉiu samideano, kaj la skribmaŝino, per kiu laborante li mortis, ĝis nun daŭre servas al Esperanto. Sur la bazo de liaj personaj esp-aj libroj nun estas organizita ĉe la Esp-sekcio "Esperanta biblioteko je la nomo

de S. V. Sariĉev", enhavanta nun ĉirkaŭ 900 volumojn. Proprajn manuskriptojn de Sariĉev pri la plej notindaj okazintaĵoj en lia esperanta vivo patose tra legis aktoro k-do N. Rytjkov.

INFORMOJ EL LA KONGRESA LANDO

* Oni enkondukis fakultativan lernadon de Esperanto en la Ŝtata Universitato de u. Sofio, en la Supera Ekonomia Instituto en u. Sviŝtov kaj en ĉiuj popolaj lernejoj.

* La ŝtata alumetfabriko nun fabrikas 8,000,000 da alumetskatoloj kun la insigno de la 48-a Universal Kongreso.

* La Ŝtata Kraĵona Fabriko "Hemus" en u. Burgas produktis 30,000 da kraĵonoj kun surskribo "Esperanto". La kraĵonojn oni vendos en la librovendejoj.

* Dum la 48-a UK. oni disdonos premiojn al gekongresanoj, kiuj estas vestitaj en belaj naciaj polkostumoj.

* Bulgara Esperanto-kinoklubo preparis 16 mm larĝan filmeton



Nature, kompare kun la ĉefurboj de la grandaj landoj, kiel ekz. Londono, Moskvo, Tokio, Pekino, Nov-jorko k.a., Sofia estas relative malgranda ĉefurbo, sed laŭ sia ĝenerala aspekto kaj kultura vivo ĝi apenaŭ povus cedi al iu ajn el ili, ke la vizitanto havu kion vidi. Krom la multnombraj kulturaj institutoj kaj institucioj, krom la diversspecaj monumentoj kaj vidindaĵoj, en Sofia estas interesaj por vizito la maŭzoleo de Georgi Dimitrov, la konstanta pentroarta galerio, la arkeologia etnografia, naturscienca, la eklezia histori-arkeologia k.a. muzeoj, multaj dommuzeoj de distingitaj bulgaroj, la bestĝardeno kaj multaj aliaj. Krome, en la limoj de la urbo kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas dekoj da mineralakvaj banejoj, kies kurackvalito estas diversspecaj.

Tamen, se estas io, per kio Sofia distingigas de pluraj ĉefurboj, tio estas ĝia pitoreska kaj ĝuinda natura ĉirkaŭaĵo. Situantaj ĉe la piedoj de Vitoŝamontaro, kiun oni difinis kiel nacia parko por ripozo, limanta kun kelkaj montaroj, Sofia proponas

al siaj vizitantoj ĉarmajn kaj pitoreskajn panoramojn kaj ĉefe ripozejojn.

Ĉetere, dum sia ĉeesto, la gekongresanoj de la 48-a U.K. de Esperanto en Sofia dum la kurlanta somero, post la dumtaga kongreslaboro, vespere havus lokojn kien iri kaj kie ripozi, ĝuante la vesperan kaj la noktan freŝan aeron, kiu abundas eĉ en la du grandaj parkoj, situantaj ĉe la du randoj de la urbo.

La Loka Kongresa Komitato, kune kun la konstanta kongresa


sekretario, s-ro T. Pompilio kaj la multnombra sofia geesperantistaro, faras ĉion eblan por kontentigi ĉiurilate la gekongresanojn.

Kaj la kongreso mem kaj laŭ sia speciala aranĝo, kaj laŭ sia multnombra aliĝo de gekongresanoj, promesas esti se ne unika, almenaŭ unu el la plej belaj kaj kontentigaj Universalaj Esperanto-Kongresoj.

Bonvenon!

IV. Kovaĉev, Bulgario

La Ŝtata Universitato de Sofia, la kongresejo de la 48-a Universal Esperanto-Kongresejo.



pri la kongresurbo "Bonan Venon en Sofio". Kvar kopioj de la filmo cirkulas en Esperantio. La membroj de la klubo kun helpo de eksterlandaj gesamideanoj, kiuj havas kinokamerojn filmigos la plej interesajn momentojn de la 48-a UK. kaj de la 19-a TEJO-Kongreso.

* En Sofio estis fondita nova Esperanto-societo kun 60 anoj. Ĝi estis nomita "48-a Universala Kongreso de Esperanto". Nun en la bulgara ĉefurbo agas ok Esperanto-societoj kaj unu Esperanto-kinoklubo.

* La montodomo "Esperanto" konstruata sur monto Vitoŝa per financa subteno de la bulgaraj kaj eksterlandaj geesperantistoj estos inaŭgurita en la kadro de la 48-a UK. La montodomon kaj ĝian Esperanto-bibliotekon povas utiligi ĉiuj turistoj, sed la Esperanton scipovantaj estas preferataj.

Nik. Nikolov, Bulgario

UEA, KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO 1963

Laŭ informo el Oslo, pluraj ministroj, deputitoj de naciaj parlamentoj, konataj filozofoj, historiistoj, profesoroj de internacia juro aŭ politikaj sciencoj kaj aliaj elstaraj personoj el 13 landoj faris proponon al la Nobel-Komitato en Oslo, ke la Universala Esperanto-Asocio ricevu la Nobel-Premion por la Paco por la jaro 1963.

(Esperanto, aprilo 1963/69)

HUNGARA BULGARA AMIKECO-VESPERO

En la budapeŝta grupo "Konkordo" okazis bonsukcesa vespero la 4-an de marto. Prof. Alfons Pechán salutis la ĉeestantojn, inter ili du polajn samideaninojn. Oni ankaŭ gratulis la novan ĝen. sekretarion de Hungara Esperanto-Asocio: k-don Ludovikon KAPITÁNY okaze de lia 50-a naskiĝtago kaj 30-jara agado en la movado. Bulgara esperantistino D. Emilia BOIKLIEV kore salutis la ĉeestantojn. S-ano Balkányi parolante pri la bul-

Propono pri la Ĝenerala Linio de la Internacia Komunisma Movado

La Responda Letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al la Letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio Datita je la 30-a de Marto, 1963 (La 14-a de junio, 1963)

ALDONO:

Letero de la Centra Komitato de la Sovetia Kompartio al la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio (La 30-a de marto, 1963)

Letero de la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio al la Centra Komitato de la Sovetia Kompartio (La 9-a de marto, 1963)

Letero de la Centra Komitato de la Sovetia Kompartio al la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio (La 21-a de feb., 1963)

110 p. 18.5 × 13 cm. Prezo: £0-1-6, Rb. 0.19

En la lingvoj Esperanto, angla, rusa, franca, germana, hispana, vjetnama, korea, japana, hinda, indonezia, birma, taja kaj araba.

Eldonis la **Fremdlingva Eldonejo**, Pekino, Ĉinio

Disvendas **Guozi Shudian**, P. O. kesto 399, Pekino, Ĉinio

gara-hungara amikeco transdonis por la biblioteko de la grupo la belan libron de Stela Blagoeva pri Georgi DIMITROV. Inĝ. Ede NEMERE prezentis siajn belegajn kolorfotojn pri sia vojaĝo tra Bulgario. S-ano G. NANOVSZKY prezentis poemon de Nikola VAPCAROV: Havas mi patron.

Okaze de la vespero la Bulgara Kulturdomo en Budapeŝto sendis diversajn eldonaĵojn pri Bulgario kaj ties direktoro.

Marin Pesev sendis bondezirojn.

Balkányi, Hungario

JUNULARA GLUMARKO

Por kontribui en la granda kampanjo de TEJO kaj UEA — "1963-JARO DE LA JUNULARO EN LA ESPERANTO-MOVADO" kaj por kontentigi la deziron de pluraj geesperantistoj, kiuj ŝatas ornami siajn leterojn per belaj glumarkoj, la Kongresa Komitato

de la 19-a Internacia Junulara Esperanto-Kongreso eldonis belan multkoloran glumarkon.

La glumarko estas vendata je eksterordinare malalta prezo:

0.30 ned. guld. (1.20 steloj) por unu folio de 10 pecoj.

Mendu la glumarkon tuj ĉe la Libro-servo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando aŭ ĉe via Landa Asocio.





Sur Nia Librobreto

Afrika Numero de TAMEN — TAMEN estas mimeografie presita organo de la Pola Esperanto-Junularo kaj Unuiĝo de Polaj Studentoj. Formato 15 × 21 cm., p. ĉ. 28. Ĝia redakcio kaj administracio: P. O. Kesto 13, Torun, Pollando.

Kiel aliaj organoj de lokaj esperantaj grupoj aŭ sekcioj, ĝia aspekto tute ne imponas. Tamen ĝi multe diferencas de la similaj per tio, ke ĝi ne limigas sin je nur formalaj informoj ne tre interesaj al ĝeneralaj legantoj, sed ofte sin dediĉas al problemoj seriozaj kaj sufiĉe gravaj. Ekzemple en ĝia 2-a numero de 1962

aperis artikolo *Neŭtraleco de la Movado*, refutante la banalan opinion pri tiu ĉi problemo, kiu fakte bremsas pluan disvolviĝon de la Internacia Lingvo kaj faras ĝin ne la sent-esprimilo kaj komunikilo de la tuta homaro, sed nur ia slango de certaj rondoj. Nun ĝia 9-10-a numero de la sama jaro alportas al ni denove rimarkindan ekzemplon.








Tiu ĉi numero estas speciala numero dediĉita ekskluzive al la problemo de Afriko. En ĝi oni legas artikolojn pri historio kaj estonteco de Afriko, pri problemoj loĝantaraj, lingvaj, klerigaj de Afriko, fragmentojn de la paroladoj de Kwame Nkrumah, prezidanto de Gano, kaj de Sekou Toure, prezidanto de Gvineo, kaj la Deklaron pri Sendependigo de Landoj kaj Popoloj Koloniaj, aprobitan de la Ĝenerala Asembleo de UN en 14, dec., 1960.

Multaj el la artikoloj estas bonaj materialoj por kompreni la problemojn de Afriko. El la paroladoj de la prezidantoj de Gano kaj Gvineo oni povas klare vidi, ke se oni volas defendi la pacon, oni devas unue batali por forigi koloniismon t. e. imperiismon. Teni la t. n. pacon sur sklaveco kaj ekspluatecon de la plej granda parto de la popoloj en

Verkoj de Maŭ Zedong Eldonitaj de ĈEL.

	P.	cm. Formato-		Rb.	£
Pri Praktiko	30	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
	28		br.	0.09	0- 0-8
Pri Popoldemokratia Diktaturo	30	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
	28		br.	0.09	0- 0-8
Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong	22	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-3
	20		br.	0.08	0- 0-6
Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio	34	13.2×18.7	bd.	0.18	0- 1-5
	32		br.	0.07	0- 0-7
Komentarioj pri la Blanka Libro	66	13.2×18.7	bd.	0.20	0- 1-7
	64		br.	0.13	0- 1-0
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an	52	13.2×18.7	br.	0.09	0- 0-9
La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj	48	13.2×18.7	br.	0.07	0- 0-7

Mendu ĉe perantoj aŭ Libro-Servo de ĈEL: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Afriko, Azio kaj Latinameriko estas nenio alia ol perforto de la landoj koloniismaj al landoj subpremataj. Tio estas nek justa nek ebla en nuna tempo.

Klare montrita en la artikolo *Afriko Estis kaj Estos Libera* estas la fakto, ke la Deklaro pri Sendependeco de Landoj Koloniaj estis aprobita de 89 voĉoj, sed sin detenis Usono, Britio, Francio, Hispanio, Portugalio, Aŭstralio, Belgio, Sudafriko kaj Dominikana Respubliko. Krom la lasta pupeta reĝimo de Usono, ili ĉiuj estas landoj koloniismaj, kaj plie ĉefaj mastroj de UN. Ili ne kuraĝis malkaŝe oponi tiun rezolucion. Sed ĝin sabotis.

La asertoj tiel popularigitaj en la imperiismaj landoj, ke la koloniistoj plenumas historian mision rilate al subevoluiĝintaj popoloj de Afriko, kiu ne scipovas regi kaj decidi pri sia sorto, ankaŭ estas ĝisfunde refutitaj per historiaj faktoj kaj sciencaj studoj en la sama artikolo. La historio de Afriko pruvis ĝuste tion, ke en la antikva Afriko evoluis kompare alta civilizacio kaj kulturo,

kaj nur post kiam venis la eŭropa "protekto" je la formoj de tributoj, konkeroj, raboj kaj sklavo-komercioj (oni notu, ke 100 miliono da afrikanoj estis sklavigitaj per tio!) la evoluo de afrika kulturo estis rompita, kaj la daŭra ekspluatado ĉiam profundigis la mizerojn de la afrikaj popoloj.

Ankaŭ la lingvaj problemoj de afrikaj landoj estas studitaj en tiu ĉi numero. La verkintino en la koncerna artikolo konkludis, ke "Malfacile ni povas ekkonscii, ke pli ol 230-miliona loĝantaro de Afriko uzas pli ol 1000 diversajn lingvojn. Tiu situacio — kaŭzo de diversaj malfacilaĵoj de la nova afrika mondo — devas esti pli aŭ malpli frue solvita . . . Tiu komuna lingvo ne devas esti ligita kun iu nacio aŭ ŝtato. . . La komuna lingvo devas esti neŭtrala, internacia."

Ĉe la fino publikiĝis ankaŭ *Malfermita Letero* al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj koncerne instruadon de la internacia lingvo Esperanto en la Lernejoj de Afriko. La alvoko estas konsiderinda por ĉiuj seriozaj esperantis-

toj. Ja, se oni deziras, ke Esperanto vivu, prosperu kaj fariĝu vere internacia, ĝi ne devas eviti la aktualajn internaciajn problemojn, sed servi al ili.

La redakta maniero de TAMEN iniciatas novan vojon por la organoj de esperantaj organizaĵoj, ankaŭ la organizado de Centro de Esploroj pri Afriko ĉe la Estraro de Pola Esperanto-Junularo donas bonan ekzemplon de la Esperanta praktikado kaj ankaŭ propagando. Mi sincere gratulas la Redakcion kaj ĈEA de PEJ.

Honfan

Rakontoj de Oogai — Tradukita el la japana lingvo de s-anoj Teruo Mikami, Miyamoto Masao, Kikunobu Matuba kaj Nozima Yasutarō kaj eldonita de Japana Esperanto-Instituto, kun formato 21 × 14.5 cm. kaj p. 118. Tolbindita, prezo: Us\$ 2.70.

Tiu ĉi libro estas eldonita por festi la centjaran datrevenon de la naskiĝo de la aŭtoro, kiu estas mult-influa klasika verkisto al la moderna japana literaturo. En la libro troviĝas kvar liaj noveloj,

Literaturaj Verkoj kaj Aliaj Libroj Eldonitaj de ĈEL.



- Knabino kaj Garolo** (kolorpresita bildrakonto)
P. 38 17×25 cm. br. R. 0.38 £0-3-0
- Karpetoj Transsaltis la Drakpordon** (kolorpresita bildrakonto)
P. 32 18×20 cm. br. R. 0.16 £0-1-3
- Sinjoro Dongguo** (bildrakonto adaptita laŭ antikva fablo)
P. 33 14.8×18.9 cm. br. R. 0.19 £0-1-6
- La Okcidenta Ĉambro** (bildrakonto)
P. 38 13×17.5 cm. br. R. 0.19 £0-1-6
- Mi Volis Viziti Lernejon** (bildrakonto, elĉerpita)
- Lerta Virineto** (bildrakonto, elĉerpita)
- Por Nova Afero Nova Maniero** (noveloj, elĉerpita)
- Homo** (12 kolorpresitaj pk. elĉerpita)
- Floroj kaj Birdoj** (12 kolorpresitaj pk., elĉerpita)
- Laŭdezira Kalkulo de Kennedy**
P. 32 13.2×18.7 cm. br. R. 0.07 £0-0-7

nome *Takase-barko* (verkita en 1916), *Sanshyô-dayû* (en 1915), *La Mesaĝo Komisiita* (en 1891) kaj *La Familio de Abe* (en 1913).

Ĉar la aŭtoro devenis de la familio de militisto-oficisto t. n. samuraja klaso servanta al la feŭda regado kaj vivis dum periodo de la *Mejĝi*-renovigo, kies karakterizo estas lernado de la okcidento por disvolviĝo de kapitalismo en Japanio, kaj li mem estis sendita al Germanio por tia lernado. Tial li spertis sufiĉe bone la ideologiajn kontraŭdirojn inter feŭdismo kaj kapitalismo. Sed ĉar la *Mejĝi*-renovigo estis farata sen forigo de la feŭda regado. Tial ankaŭ li ne povis plene forskui en sia ideo la feŭdan katenon.

Tia animostato estas bone montrita en la noveloj en tiu ĉi libro. Ekzemple en la novelo *La Familioj de Abe* li kritikis feŭdan tradicion de mort-akompano, sed aliflanke li laŭdis la samurajismon, kiun heredis la japana militarismo de ĝia feŭda socio.

Tia kritiko al japana feŭdismo saturis ĉiujn kvar novelojn en la

libro, sed ĉiu de aparta flanko. En tiu ĉi senco, la malofta sufiĉe impona esperanta libro eldonita de JEI efektiviĝos la celon prezenti al la legantaro la trajton de japana socio sub feŭda regado.

La traduko kredeble estas tre fidela al la originalo kaj en korekta Esperanto. Ĝenas nur tio, ke tro multe da neologismoj japan-devenaj estas uzitaj. Kaj ankaŭ la amasiĝo de propraj nomoj difektis la agrablon de la legado. La averto pri tio de la kompilinto sur p. 105 ŝajne tute ne solvis la problemon.

Entute libro rekomendinda por tiuj, kiuj volas kompreni Japanion. Mi gratulas la sukceson de JEI eldoni tian libron, kaj esperas, ke sekvos baldaŭ simila volumo el la moderna japana literaturo. Ja estas multe pli grave por esperantistoj kompreni la nunan Japanion ol la antikvan.

Honfan

Unua Lernolibro de Esperanto — 17 × 12 cm., 72 paĝoj. Eld. de Tamtama Eldonejo, Tesaloniko. Prezo: duona usona dolaro aŭ egalvaloro.

La malgranda libro estas kompilita ĉefe el Zamenhofaĵoj: Ekzercaro, proverboj kaj kolekto da legajoj. La 16 reguloj de Esperanto kun kompletigo per klarigoj pri afiksoj estas distribuitaj en 26 lecionoj kiujn konsistigas la tuta materialo de *Ekzercaro* kun aldono de proverboj. En la unuaj lecionoj estas donitaj demandaroj, laŭ kies modelo lertaj kursogvidantoj certe scios ilin plivastigi kaj plietendi. La libro prezentas densan lernomaterialon, kvankam malnovan sed senigitan je dubebonaj tekstoj kaj nenaturaj esprimoj, kiajn oni bedaŭrinde renkontas en iuj lernolibroj. Por seriozaj plenaĝaj studentoj sub lerta kursogvidanto la libro povas esti utila lernilo. Nacilingva klarigo estas limigita nur al la unuaj tri lecionoj ĉefe pri la prononco.

La klarigo pri *em* (p. 49) per "signifas: oni kutimas esti ata" estas ne trafa.

La libro estas klare presita, sed de tempo al tempo oni renkontas preserarojn.

I. O.

Ĉina Antologio (1949-1959)

P. 416 23×15.3 cm. bd. R. 1.20 £0-10-0

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko

P. 88 18.5×26 cm. bd. R. 0.60, £0-3-6

Vivu Leninismo

P. 110 14×20.2 cm. br. R. 0.16, £0-2-0

Rakontoj pri Fantom-spitantoj

P. 104 12×18.7 cm. br. R. 0.33, £0-2-7

La Kultura Vivo de la Ĉinaj Laboristoj kaj Oficistoj (kun 90 fotoj)

P. 72 16.2×18.4 cm. br. R. 0.25, £0-2-0

Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo kun 48 fotoj, el ili 13 kolorpresitaj)


P. 52 24×26 cm. br. R. 0.63, £0-5-0

Pitoreskaĵoj de Pekino (12 kolorpresitaj pk.)

br. R. 0.13, £0-1-0

Noveloj de Lusin

P. 534 13×21 cm. bd. R. 1.61, £0-12-0





Korespondi Deziras

* **En Harbin nun funkcias E-rondeto**, kiun gvidas k-do Ĝang Jan, estro de la Hejlonggiang-provinca Biblioteko. Por propagandi grandskale la lingvon internacian ni aranĝos E-ekspozicion. Estas atendataj diversaj materialoj: E-libroj kaj gazetoj, salutkartoj k.a. Ni ankaŭ deziras korespondi kun seriozaj esp-istoj kaj E-rondoj pri E-movado kaj aliaj temoj kaj interŝ. Esp-aĵojn. Ni deziras ricevi E-librojn precipe pri Esperantologio kaj gramatiko, E-gazetojn kaj diversajn esp. vortarojn. Rekompence ni sendos E-librojn eldonitajn en nia lando. Resp. garantiata. Adr.: K-do Ĝang Jan, Harbina Esp. Rondeto, Hejlonggiang-Shengtushuguan, Harbin, Ĉinio.

* **R. Suess**, Karl-Marx-Stadt W 33, W. Wolff-Str. 13, Berlin, DDR, kun ges-anoj el Azio per il. p. k., leteroj kaj interŝ. pm.

* **Salutkartojn ni atendas el la tuta mondo por nia letervespero**, per kiuj la vivkapablecon kaj disvastiĝon de Esp. ni deziras pruvi al la loĝantaro de nia urbo. Resp.

garantiata. Adr.: Bénik Gyula, Kis u. 4. VAC. Hungario.

* **Danka Koleva**, Oktomvrijska-revoljucija-str., bl. n-o 425, vh. 4, ap. 14, Kolarovgrado, Bulgario, kontistino, dez. kor. pri ét. kun él.

* **Ivan Vasilev**, Mitropolit-Simeon-str. 105, Kolarovgrado, Bulgario, kontisto, kor. kun él. pri ét.

* **S-ro Jose Povedano**, French 1375, Rosario, Rep. Argentina, pri ét. kaj interŝ. pm. kun landoj aziaj.

* **Djamhari Praptaharsana**, Santren, Gunungpring, Muntilan, Magelang (Djateng), Indonezio, kor. kun él. kaj interŝ. pm, bk, fotojn.

* **Donka G. Atanasova**, str. M. Rubenova 50, Jambol, Bulgario.

* **Georgi Jordanov**, str. Deveti Septembri 12, Jambol, Bulgario (jurnalisto).

ATENTON, ARKITEKTOJ!

La ĉefurbo de la respubliko Kubo, Havano, estos la sidejo de l' VII-a Kongreso de la Internacia Unuiĝo de Arkitektoj. De la 29-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro, 1963, kunvenos tie proksimume 3.000 delegitoj de diversaj landoj, kaj unufoje tia evento okazos ekster Eŭropo. Ĉiuj esperantistoj partoprenontaj estas invitataj de nun kontraktiĝi pri tio kun s-ano Raúl Juárez-Sedeño, Apartado 570, Camagüey, Kubo.

EL Popola Ĉinio

Dumonata gazeto eldonita de
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (81) 1963

Ĉefa Enhavo


Printempo Venis al Ĉaŭbaj-Rivero	159
La Ĉina Medikamenta Industrio	160
Metia Urbo en Tibeto	162
Laboristo-matematikisto	164
Dekmil Marmejloj da Vojaĝo	167
La Minista Lampo	169
Botanika Ĝardeno en Tropika Arbaro	178
Sur la kovrilo: En Parko	
Sur la dorskovrilo: Mateno ĉe la Okcidenta Lago	



★ Ĉiuj materialojn por nia redakcio aŭ por interŝanĝo sendu al P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

★ Ĉiuj perantoj, abonantoj kaj specimen-petantoj de nia gazeto sin turnu al **Libro-Servo de ĈEL**: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

★ Tradukoj, represoj kaj ĉiuj aliaj bonvolaj utiligoj de la materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj, ni petas nur tion, ke oni menciu devenon de la materialoj kaj sendu al ni du ekz. de la presaĵo sur kiu aperis la koncerna materialo.



Nova Libro
NOVELOJ DE
LUSIN

Preskaŭ kompleta novelo-kolekto de la majstro de moderna ĉina literaturo. 13 × 21 cm., 534 paĝoj, riĉe ilustrita.

Prezo: 25 steloj, £0-12-9, Rb. 1.61

Mendu ĉe niaj perantoj aŭ Libro-Servo de ĈEL.

Ŝanhajaj gejunuloj partoprenantaj agrikulturan produkton aŭskultas parolon de la brigadestro pri preventado de malsanoj kaj fiinsekta plago de hordeo.

Foto de Ŝeng Cubej



Membroj de la Popola Komunumo "Lotusfloro" de Longhaj-gubernio, Fugian-provinco, transplantas rizplantidojn.

Foto de Li An



